



Internacia Bulteno



Germana informilo pri la milito
kun la aldono: Literatura Revuo



Herausgeber (eldonto): Deutscher Esperanto-Dienst (Germana Esperanto-Servo), Berlin S 59, Wißmannstr. 46 — Verlag (eldonejo): Friedrich Ellersiek, Esperanto-Verlag, Berlin S 59.

La gazeto aperas post la 15a de ĉiu monato. Abonprezoj: por 12 monatoj 4. — M, por 6 monatoj 2. — Mi, unu numero 0.40 M. — Anoncoj laŭ speciala tarifo demandebila ĉe la eldonejo.

No 6 (54)

Junio 1918

4a Kolekto

Enhavo

Politiko kaj ekonomio: Klasika atestanto — La kulpo de Francujo pri la mondmilito — Bonevole Anglujo nenion redonas — Wilson pri Prusujo-Germanujo — Malbonaj profetoj — Ciémenceau la plifongiginto de l' milito — La batalo de Anglujo kontraŭ la germana industrio kaj la germanaj laboristoj — Franca militgazeto en germana lingvo.

Milito kaj militado: La militaj okazintaĵoj en la tempo de l' 18a de Marto ĝis la 17a de Aprilo — La rezulto de l' ne limigita U-boata milito en Aprilo 1918 — Kiel francaj soldatoj malbonkondukatas en la propra lando — „Germana barbaro“.

La mensoga milito: „Se kalumnio eĉ pasas, ĝi ĉiam ion lasas“ — La morto de Richthofen kaj la francoj — Franca falsado.

El la legantaro: „La barbaroj“ ĉe Thames — Redakcia korespondo — bildoj.

Literatura Revuo: Pro kio? (5a daŭrigo)

Plej gravaj okazintaĵoj en Majo

3. Provizora perfektigo de la pakkontrakto kun Rumanujo. 4. Germanaj kaj finnaj trupoj decidige venkas la malamikon en Finnlando. 10. Malsukcesinta surprizatako de anglaj marbatalfortoj kontraŭ Ostende. 21. Francaj trupoj vane provas rekonkeri por la angloj la montetaron Kemmel en Flandrujo. 24. Malsukcesinta atako de la italoj sur Zugna Torte kaj en Etsch-valo. La aŭstri-hungaraj trupoj firmtenas siajn poziciojn. 28. Komencigo de nova germana ofensivo sude de Laon (Francujo). 28.—31. Daŭrigo de la germana ofensivo, kiu bone progresas kaj devigas la aliancanojn al cedo de granda teritorio kun gravaj pozicioj.



La paciĝo kun Rumanujo

Post la efektivigita paciĝo la germana „Bukarester Tageblatt“ eldonis ekstran eldonon anoncantan la ĝojigan faktan en la rumana ĉefurbo.

Politiko kaj ekonomio

Klasika atestanto

La disputo de la opinioj pri la demando, al kiu estu aljuĝata la kulpo pri la krima mondmilito, ankoraŭ longe furiozas, kiam la batalo de la armeoj de longe estos finita. Antaŭ la tribunalo de la mondhistorio la diversaj voĉoj estos aŭdataj kaj pesataj. Tiam inter la atestantoj ne forestos la angla verkisto *Bernard Shaw*, kaj lia grava juĝo multe pezos sur la pesiltelero de la justeco.

Ni prezentas tiun eldiron de atestanto al la aŭdo kaj kompreno de la publiko, reproduktante en laŭsenca traduko la multe preparolitan artikolon de *Bernard Shaw* pri la pli profundaj kaŭzoj de la milito.

La vigla batalo, kiu tuj en Decembro 1914 pri la publikigado de *Bernard Shaw* komenciĝis en la angla gazetaro, prezentas en hela lumo la gravecon de la atestanto kaj lia eldiro. Estas vere, ke tuj poste la eldiro de *Bernard Shaw*, tiom ŝarga kaj danĝeriga por Anglujo, estis sufokata kaj forsilentata. La politika sento de la angloj ankaŭ en tiu okazo admirinde montriĝis. Des pli la kontraŭuloj de Anglujo havas kaŭzon, tiun eldiron de atestanto tiri al la lumo kaj ne lasi forgesiĝi.

Jam la surskribo de la artikolo estas karakteriza: *La lasta salto de la maljuna leono*. Sprite kaj trafe *Shaw* per malmulte da strekoj desegnas la situacion kaj politikon de Anglujo de post Waterloo; majstra estas la desegnado de la situacio en 1911: la brita leono estas eksaltonta — sed Germanujo reiras unu paŝon kaj konservas la pacon. La okazo, terenbati la fortiĝantan rivalon, ŝajnas preterlasita. La leono cerbumas: ĝi sentas, ke Germanujo ne volas batali. —

Sed ni lasas paroli *Bernard Shaw* mem. Kvankam irlandano, li tamen tutkore estas *Britisher* kaj imperialisto. Sian konfesion de kredo li resumas en la lastaj frazoj de sia memorinda

artikolo per la vortoj: „Leono intersiaj limoj lastinstance estas leono en kaĝo.“ La morala drapiraĵo tiom ŝatata en Anglujo ne mankas al li. Sed li foje demetis la anglan hipokriton kaj malkaŝe eldiris, kion la angloj pensas en sia plej interna koro.

Jen kial la kriegado en la angla tendaro kaj poste la silentado.

La lasta salto de la maljuna leono

(Traduko)

Kio ankoraŭ fariĝu el la angla gazetaro, se ĝi en la tuta franca Flavlibro scias trovi nenion alian, ol ĝuste la solan makulon, kiu malornamas la dokumenton? En la unua eksciteco kaj rapidemo de la militeksploido eble ankoraŭ estis kompreneble, se oni akceptis tiun dekretion, en kiu la imperiestro, en la germana lingvo ne trovante taŭgan esprimon, sian armeon simple admonis, ne zorgi pri la francaj kaj rusaj milionoj (jen!), sed koncentrigi sian tutan koleron al la malsatinde malgranda armeo de generalo French. Tamen jurnalista utiligo estus estinta komprenebla kontraŭ la „oficiala kaj sekreta raporto el certa fonto“, kiun M. Etienne la 2an de Aprilo 1913 sendis al M. Jonnart. Pri la akcepto de tiu raporto ĉe M. Jonnart la kroniko de la Flavlibro kontentiĝas silenti. Sed mi volas tuj diri, ke mi ne mistifikigi per tio kaj ke la legantoj de mia artikolo ne bezonas timi plujajn komentariojn pri tio.

Kaj tamen el la aŭtentika parto de tiu Flavlibro rezultas tiom entuziasmiga bildo, ke mi ne povas sufiĉe miregi, kial ankoraŭ ne trovis sin anglo, kiu elŝeligis tiun bildon el la kovraĵoj de la oficiala korespondo. Nome en la bildo restariĝas antaŭ ni la malnova leono, la leono de Waterloo, la leono de Blenheim, la leono de Trafalgar, prepariĝante al sia lasta plej terura kaj venka salto. Ne difektita vi vidas la malnovan ruzegon, la malnovan kuraĝon, la malnovan forton, ankaŭ la malnovan mirigan bonŝancon, la malnovan tendencan al la unu celo, la malnovan profunde kaŝitan kaj subtilan instinkton, kiu en danĝero sen grandaj viroj atingas pli ol ĝiaj malamikoj kun tiaj.

Jam de jarcentoj la leono meditas pri la unu celo: neniu estu pli granda sur la tero ol Anglujo, neniu same granda kiel Anglujo sur la maro. Ĉu rivalo estas pli bona aŭ pli malbona ol Anglujo, tio al la leono ĉiam estis indiferenta. Kiam Waterloo estis trabatalita kaj gajnita, Byron skribis: „Tion mi diable bedaŭras.“ La rivaloj pri egaleco kaj humaneco terurigitaj vidis, kiel anglaj bataliloj sur la ruinoj de libereco, egaleco kaj frateco restarigis la inkvizicion kaj refondis la tronon de fatala, elvivinta dinastio. Kiom gravas por la leono! La kontraŭuloj de Anglujo kuŝis en la polvo, Anglujo estis la mastro de la maro; la ĉefkomandanto de Anglujo (kvankam nur irlandano, sed kiom ĝenas?) estis la sinjoro de Eŭropo; reĝoj en lia ĉeesto kuraĝis nur flustri kiel timigitaj lerneĵanoj; Anglujo, indiferece ĉu prave aŭ malprave, ĉi-okaze tute kaj plene Anglujo, en sia kunnaskita putreco kaj perfortemo, kiel ankaŭ en sia kunnaskita grandeco kaj sia gloro, vere angle estis forlasinta la batalkampon kaj tenis la ekvilibron de la potenco en sia mano. Cent jarojn neniu anglo plu sciis, kion signifas paliĝi pro la ebleco de malamika invado. Dum du generacioj la leono kuŝis, ĝuis la sunbrilon kaj suspektis nenion malamikon, kiun bato de ĝia piedego ne estus povinta frakasi.

Jen levigis nova rivalo. Bataloj pli teruraj ol Waterloo estis liverataj kontraŭ la sama malamiko; sed ne Anglujo estis la venkinto. La leono elektigis kaj komencis aŭskulti. Tiu malnova instinkto vekigis en ĝi. El granda malproksimo flugis al lia orelo la sono „Germanujo, Germanujo super ĉio“, kaj en sia interno li diris: „Ne dum mia vivtempo!“ La rivalo konstruis militŝipon, konstruis ankoraŭ militŝipon kaj poste ankoraŭ unu: malkaŝa provoko por la reganto de la maroj! Jen la afero estis finita. De post tiu momento dube estis nur, kiam la leono eksaltos. Nome leono, kiu estas plenigita de tiu unu sola ideo, kies vivintereso sidas tiom profunde en ĝiaj intestoj, devas esti ruzega: ĉiu-circonstance ĝi devas gajni,

kiom ajn longe ĝi devus atendi ĝis la ĝusta momento.

Tiun vi nun vidas venanta en la Flavlibro. La fingron ĉe la ĉano, Germanujo kaj Aŭstrio, Ruslando kaj Francujo ĉasiras unu krontraŭ la alia. Francujo evitas la batalon, Ruslando jam ekzercas kaj armas sin, kaj Aŭstrio kalkulas kun ĝi; sed ĉiuj, ankaŭ Aŭstrio, angoras pro la rivalo de la leono, Germanujo. Francujo pro nombra malsupero ree kaj ree aranĝas sian manovron por la paco. La konduto de Germanujo kontraŭ Francujo kaj Ruslando ja estas obstina, kun nuanco de malsato, ĉar ĝi nur tro bone scias, ke ĝi povas mortpremi la unu malamikon per sia dekstra brako, la alian per la maldekstra. Sed la leonon ĝi tamen timas; se ĝi venas helpi Francujon kaj Ruslandon, tiam la supereco eĉ por la venkinto de Sedan fariĝas tro timinda. Francujo sondas la leonon: la leono, kolera kaj singarda, konsentas, ke ĝiaj direktantaj maristoj kaj armeanoj parolas kun la francaj generaloj kaj kun ili detale diskutas, kio povus okazi kaj kian kuron oni povus doni al la afero. Jen Francujo subite bruskas Germanujon, postulas de Germanujo, forigi el Maroko, kaj tion tuj. Germanujo rigardas la leonon kaj vidas ĝin preta al eksalto, kun tremanta vosto. La pliforto de la kontraŭuloj estas troa: Kun aflikto en la koro Germanujo reiras, la unuan fojon bruskite de post la leviĝo de sia stelo.

Tio malebligas la projektojn de la leono. Ĉu atendi ankoraŭ kelke da jaroj? La brita impost-paganto povus perdi la paciencon, konservi la antaŭecon al tiu kreskanta ŝiparo. La malnova instinkto murmuretas: „Nun ekagu, nun, antaŭ ol la rivalo estos tro forta.“ Oni laŭte diras tion en la stratoj de London. Sed novaj fortoj estas en la ludo, kiujn la leono devas konsideri en sia kalkulo: se la alia ne volas batali, ne estas tiel facile, ataki lin. Kaj Germanujo ne volas batali, se ĝi ne povas disigi la leonon de Francujo kaj Ruslando; sed ĝi sentas sin vundita post la humiliĝo kaj brusko; ĝi scias, ke nur

unu afero povas restarigi ĝian reputacion kaj sanigi ĝian difektitan fieron, nome punado al la bruskintoj. Sed nenio restas al ĝi, ol subpremi la furiozon; ĉar ĉe ĉiu minaco Francujo montras la leonon kaj tiel savas la pacon deziratan nur de Francujo. Ĉiufoje, kiam Germanujo toleras humiligon, tio vanigas la projektojn de la leono; Aŭstrio prokrastas siajn balkanajn planojn, kaj Ruslando ne precize scias, ĉu ĝiaj intencoj estas malebligataj aŭ nur prokrastitaj.

La leono cerbumas kaj cerbumas; profunde en ĝia subkonscio naskiĝas la ekkono, ke Germanujo tute ne volas batali, escepte, se — se — se — la leono ne precize scias, se *kio*, ankaŭ neniel volas scii *kio*; sed ne koncernataj rigardantoj kompletigas la frazon jene: escepte, se oni povus kredi al Germanujo, ke la leono subite ekardis en amo al ĝi, ke li fariĝis pacifisto kaj ne volas batali.

Jen feliĉa stelo, kiu preskaŭ ĉiam lumis al la leono, venigas princon Lichnowsky kiel germanan ambasadoron al London. Ne estis malbonaĵo, se oni tre afable traktis lin, ĉar la princo estas ĉarma viro kun tre ĉarma edzino. Jen do ankaŭ nia Sir Edward Grey, ankaŭ ĉarma viro, ĉiam estis preta, ĉe tesocietoj tute malkaŝe paroli pri la paco, kun la tuta Eŭropo, se devis esti. La leono sciis en sia koro, ke Grey neniam sciis pri leona moralo, ne aprobus ĝin, se li ion sciis pri ĝi. Nome Grey havis ideojn anstataŭ unu sola ideo. Kaj Lichnowsky ankoraŭ tiom malpli sciis pri leona moralo, ke li opiniis, ke Grey mem estas la leono. La leono pensis: „Mi ne faris tion; la sorto de Anglujo sinjorojn Grey kaj Lichnowsky metis ĉi tien. Ankoraŭ la stelo de Anglujo estas en la zenito.“ Al princo Lichnowsky Grey de tago al tago ŝajnis pli granda kiel politikisto kaj pli ĉarma kiel homo; de tago al tago li fariĝis pli firma en sia konvinko, ke la koro de la leono elfunde ŝanĝiĝis kaj ke la leono iom post iom fariĝis vere kaj ĝuste afabla. Kaj Grey eble opiniis Lichnowsky stultulo, sed pro tio ne estis malpli afabla kontraŭ li.

Nun venas Asquith, la lumanta juristo, la viro povanta nek memori pasintaĵojn nek antaŭvidi okazontaĵojn; sed ĉiam la vera Yorkshire-viro, kiu sub spegule glata, lumanta supraĵo kaŝas malnovegan anglan profundigejon, kaj en kiu povus troviĝi iom de la ruzeĝo de la leono, ne malklarigante la spegule glatan supraĵon. Asquith do subitege en la plej profunda interno trovas sin animita de ne klarigebla, sed plene ne kontraŭstarebla impulso instiganta lin, vuali kaj kontesti tiujn interkonsentojn kun la direktantaj francaj generaloj, kiuj timigis Germanujon. Li diras al Grey:

„Vi devas iri al la francoj kaj diri al ili, ke ni ne estas ligitaj per iu promeso.“ La afabla pacifisto Grey estis ravita. Li iras, kaj la francoj, ĝentilaj kiel ĉiam, notas la komunikon. Jam Asquith kaj Grey, ambaŭ kun pura konscienco, trovas sin vigle okupitaj, konvinki la mondon, ke la leono ne estas ligita, helpi Francujon kaj Ruslandon, kiam venos la granda tago de la mondosorto. Ili fakte konvinkas la anglan popolon; ili konvinkas la Malsuperan Cambron; ili konvinkas sian propran ministerion kaj fine — fine — ili konvinkas ankaŭ Germanujon. Kaj la leono kaŭras saltonte. Preskaŭ eĉ antaŭ ol ĝi estas tute preparita, la diablo de favora sorto murdigas la ĉefdukon, kaj Aŭstrio fine vidas Serbujon subsia potenco. Aŭstrio jetas sin sur Serbujon, Ruslando sur Aŭstrion, Germanujo sur Francujon; kaj nun fine ankaŭ la leono kun potenco kriegado jetas sin sur sian kaptaĵon kaj tuj penetrigas siajn dentojn kaj piedegojn en la korpon de sia rivalo. Ne pro ĉiuj pacifistoj kaj socialistoj en la tuta mondo ĝi nun ree ellasos tiun, ĝis kiam li mem kuŝas aŭ mortinta sur la tero aŭ ree sur sia piedestalo de Waterloo.

Jen vi havas la eposon de la Flavlibro, sinjoroj de Anglujo! Jen kio estis la blekegado, kiun viaj butikistoj pretendis esti ne aŭdintaj, ĉar ili nur de timo pro la germanoj solene asertis, ke ĝi estas nur la kriadado de paca ŝafaro surprize atakita de vulpo. Kiel vi babilos pri malnovaj traktatoj, sin-

jeroj, kaj zorgos, ke oni certe disvastigu, ke vi ne estas kapablaj al la hontindaĵo, la murmuregon de la leono respondi per hurao el via propra koro; ne estas kapablaj, elpensi la mizerajn fabelojn — same kiel pli antaŭe: Bonaparte forglutas infanetojn; ne kapablaj, elpensi ĉiujn ĉi tiujn frenezajn mensogojn kaj senhontajn kalumniojn kontraŭ la malamiko, kiun vi devus kontraŭbatali nur per via glavo kaj kiun vi mem pro tio zorge devus gardi de ĉiu batalilo malpli nobla ol via glavo.

Koncerne min, mi komprenas la historion; mia mio estas forŝirata de entuziasmo pri ĝi; mi perceptas la ĉiopovon kaj lamisteron, en ĝi bazitan; kaj plej diversaj kordoj en mia interno kunsonas en la postulo, ke la lasta batalo de la leono estu ankaŭ ĝia plej bona kaj ke Germanujo estu ĝia lasta venkita kontraŭulo. Sed mi estas socialista kaj bone scias, ke la tagoj de la leono estas kalkulitaj kaj ke eĉ la plej kuraĝa leono en la fino de la finoj fariĝas viktimo de la ĉasistoj. Mi antaŭvidas, ke ĝia venko nunfoje ne alportos al ĝi, kiel antaŭaj venkoj, jarcenton de sekuro: Kontraŭe, mi scias, ke ĉi tiu venko kreos situacion ankoraŭ pli danĝeran, ol antaŭ duonjara, ke tiu situacio povos esti majstrata nur tiam, kiam ĉiu unuopa nacio de la okcidentaj ŝtatpotencoj rezignos ĉian revon pri superreĝo. Nun leono inter limoj lastinstance estas nur leono en kaĝo, kaj la venontaj tempoj ne havos uzon por enkaŝigitaj leonoj batalantaj nur, por defendi siajn poprajn katenojn. En estonteco ni do devos batali ne nur pro Anglujo, sed pro la bono de la tuta mondo. Ne domaĝas, la leono tamen estas nobla maljuna besto: ĝi pasigis brilajn tempojn, ĝia idaro hodiaŭ estas pli kapabla ol iam, vere multe tro kapabla, por nur ludi „*Albion contra mundum*“. Mi deprenas mian ĉapelon, salutante la leonon, kaj ŝvingas ĝin, malgraŭ ĉia pepado de la ektimigitaj kokidetoj.

Tiel skribis Bernard Shaw.

La brita leono, la genio de Anglujo, la brita popolo, tiuj volis la militon

kaj nur atentis la okazon, ekbati kontraŭ Germanujo; ĝuste same kiel Anglujo dum la daŭro de la lastaj jarcentoj unu post la alia terenbatis ĉiujn siajn rivalojn, detruis iliajn ŝiparojn, rabisiliajn koloniojn: Hispanujo, la Nederlandojn, Francujon. Eĉ la malgranda ŝiparo de Danujo devis estis detruata.

Kiu legis la anglajn incitgazetojn de post la komencigo de nia jarcento kaj observis iliajn sistemajn malamikaĵojn kontraŭ la germana rivalo, al tiu ne restas dubo, ke la atesto de Bernard Shaw estas vero, en ĉiuj esencaj punktoj.

(N. A. Z. 138)

La kulpo de Francujo pri la mondmilito

De intima konsilanto prof. Dro.

R. Sternfeld, Berlin.

Ke Francujo havas la veran kulpon pri la mondmilito, povas esti pridubate de neniu komprenema. Se en la lastaj tagoj antaŭ la militeksplodo Ruslando estis la „ekbruliginto“, se Anglujo flanke de ĝi portas plej pezan kulpon, ĉar ĝi estus povinta malebligi la militon, Francujon trafas la riproĉo, ke ĝi per sia konduto dum la kvar jarcentoj de post 1871, per siaj armadoj, sia venĝema spirito kaj incitado ne lasis naskiĝi konfidon kaj trankvilan apudeston de la popoloj de Eŭropo. La venĝemo, arte nutrita kaj ekscitita, venenis la pacon, krime elvokis la militon kaj Francujon mem faligis en la abismon, el kiu ĝi neniam plu povos eliri.

Ree kaj ree ĝis hodiaŭ estis asertate, ke la perdo de Elzaso-Lotaringo elvokis la venĝemon, ke Germanujo do estas kulpa, se por Francujo de post 1871 neniu sincera paco kun la germana najbaro estis ebla. Sed same de alia flanko estas klare pruvite, ke ne la perdo de Elzaso-Lotaringo, sed la malvenko en la milito kaj la ofendita vanto de la glorama franca nacio estis la kaŭzo de la venĝemo. Post la militoj de liberigo en 1815 Francujo perdis nur tute malgrandan teritorion. Tamen ĝi serĉis en la tuta tempo ĝis 1870 okazon, gajni teron kaj militan

gloron, ĉar ĝi ne povis forgesi la multgloran tempon de Napoleono, ne konsoligi pri la malvenkoj de 1813 kaj 1815, ne forlasi la regantan pozicion en Eŭropo. Kiel jam en 1815 diris la angla ministro Liverpool: „Francujo neniam pardonos la humiligon, sed ekuzos la unuan okazon; restarigi sian militan *glorie*“, ankaŭ Bismarck ofte akcentis, „ke ankaŭ sen forcedo de teritorio postrestus en la franca nacio la sama malamo, la sama venĝemo pro la ofendita vanto kaj regemo.“ Kio estis la kaŭzo de tio, ke Napoleono IIIa ree kaj ree volis eluzi germanajn limteritoriojn ĉe la Rejno? Li sentis, ke lia imperiestreco ne estas firme bazita, se li ne havigos al la francoj kiel „revenĝon pro Sadowa“ landpliiĝon kaj per tio donos konsolon pri la kresko de Prusujo.

Kiam en 1871 la venko estis perbatita, la nova Germana Imperio neniel povis rezigni Elzaso-Lotaringon, ne nur ĉar la germana popolo unanime postulis la regaĵon de la malnova germana iam forrabita al ĝi lando, sed ankaŭ ĉar la ŝirmo al Suda Germanujo postulis tiun sekurigon kontraŭ la atakoj de la malkvieta franca najbaro. La reĝna limo kiel eterna minaco por Germanujo ne pli longe devis ekzisti.

De nun komenciĝis la senlaca laborado de la novaj potenculoj en Paris, provi ŝanceli la fiksitaĵojn de la „Frankfurt-a Paco“. Montriĝis, ke la respubliko ne estis pace inspirita, sed favoris ĝuste ambiciajn politikistojn, kiuj incitante la instinkton de potencoemo volis akiri influon kaj oficojn. La espero de Bismarck, per fortigo al la nova respubliko forteni militemajn tronpretendantojn kaj per koloniaj akiroj trankviligi la francan ambicion, ne realiĝis.

„Neniam paroli, sed ĉiam pensi pri tio!“ estis la justrukcio de Gambetta, la plej populara homo en Francujo. Kaj li, kiu en 1870 organizis la kontraŭstaron, nun komencis ankaŭ la eksteran politikon direkti sur la vojojn kondukantajn al la mondmilito: firma ligo kun Ruslando kaj alprok-

simiĝo al Anglujo. Ambaŭ estis favorataj per la potenca plifortigo de la Germana Imperio, kies pacan politikon suspektigi oni bonege sciis ĉe la Seine. Por gardi sin de la opiniata surprizatako, en realo, por prepari la revenĝon, Francujo riskadis plej multkostajn armadojn, ĉiam aprobitajn de la popola reprezentantaro. Krome oni uzis tiun revenĝon, por liberigi sin de la internaj komplikaj, ĉar en ŝovinismo ĉiuj partioj, klerikuloj kaj radikaluloj, monarĥanoj kaj respublikanoj, estis unuecaj.

La ligiĝo kun Ruslando okazis en la naŭa jardeko. La francaj ŝparantoj deponis sian monon en rusaj biloj tiel, ke iom post iom 20 miliardoj da francoj iris al Ruslando. En 1891 franca ŝipeskadro venis al Kronstadt, en 1893 rusa al Toulon. La nova caro Nikolaŭs IIa en 1896 aperis en Paris kaj en 1897 la unuan fojon uzis la vorton „alianco“ pri la ligo fiksita en sekreta traktato.

De post 1900 la venĝemo pli forte montriĝis. La naciistaj pasioj estis kreskigataj per la proceso Dreyfuß. Kaj nun la nova generacio estis grandiginta, kiu ĉarimede en lernolibroj, kantaĵoj, paroladoj kaj traktaĵoj estis instigata, liberigi la provincojn „rabitajn“ kaj laŭdire sklavigitajn de Germanujo. Kion Déruléde, la bardo de la germanmalamo, kaj lia ligo de patriotoj estis seminta, nun ekgermis. Ministro Delcassé atingis la decidigan turnon: la proksimiĝo al Anglujo, kun kiu oni ankoraŭ en 1898 en Faŝoda malamike koliziis, efektiviĝis de post la surtronigo de Edward VIIa kaj densiĝis en Aprilo 1904 al traktato, en kiu Francujo rekonis la britan establiĝon en Egiptujo kaj kompanse ricevis agliberon en Maroko. Per tio estis fondita la *entente cordiale*, kaj Francujo povis, se ĝi ankoraŭ sukcesis interamikigi Ruslandon kaj Anglujon, esperi pri la du *plej potencaj liganoj* en sia venĝa milito kontraŭ Germanujo. Per tio kreskis en la nacio la manio de grandhomecoi; malpura, plene sendigna gazetaro incitis la publikan opinionon kaj suspektigis ĉiun paŝon de Germanujo kaj ĝia imperi-

estro; la malnova militemo estis nurtrata de ambiciuloj tenantaj sian popularan pozicion kaj de internaciaj financpotenculoj, kiuj volis per koruptoj akceli siajn borsnegocojn.

Ankoraŭ Francujo en 1915 devis recedi kaj Delcassé ekŝiĝi, ĉar Ruslando, venkita de Japanujo, estis tro malforta; sed en 1908, kiam Edward vizitis la caron en Reval, la nova sistemo de la tri-alianco gajnis firman fundamenton: Ruslando havigu al si kompenson sur Balkano. Francujo estis la cemento de tiu ligo kaj rezignis pli kaj pli memstaran politikon: ĝi ne riskis paŝon povantan dubebliĝi ĝian ligitcon al Ruslando, kaj en 1912 ĝi forigis sian ŝiparon el Norda Maro, kie Anglujo ŝirmu ĝin. Ĉiam pli malvaste nun la reto de Entente kuntiriĝis ĉirkaŭ la Germana Imperio. La franca militpartio estis tiom fortiĝinta, ke en Julio 1913 ĝi povis akceptigi la pezan ŝarĝon de la trijara militserva tempo, post kiam Poincaré, la lotaringano, fariĝis prezidanto de la respubliko.

Pri li kaj liaj ministroj Delcassé kaj Millerand komence de 1914 la belga ambasadoro Guillaume skribas, ke ili sekvas „ŝovinistan kokardan politikon“ kiu grave endanĝerigas Eŭropon. De ĝi firmeco ne estis atendebla, se eksplodus milito inter Ruslando kaj Germanujo.

Tia do efektive estis la konduto de la Paris-aj politikistoj post la mortigo al la aŭstria tronheredanto: Francujo ĉion estis metinta sur la karton Ruslando, sed tamen timis, esti frakasata de Germanujo, kaj tial alcentrigis ĉion al la celo, instigi Anglujon al militista helpo. La franca nacio timis la militon, kaj tamen lasis partoprenigi sin, ĉar ĝiaj potenculoj neniam povis iri ĝis tio, kun Germanujo admoni pri paco tie, kie ĝi estis minacata: en Ruslando. Ili esperis, ke Germanujo estos fortimigata de la danĝero; se ne, ili riskis militon, ĉar, se iam, nun devis sukcesi la rekonkero al Elzaso-Lotaringo, kun la helpo de la du plej potencaj regnoj, kiujn Francujo en multjara laboro

estis kunkondukinta por detruo al la malamata Germanujo.

Tiel Francujo, minacate de neniu malamiko, certa pri sia venko, eniris militon kondukantan al ĝia perco!
(D. K. 222)

Bonvole Anglujo nenion redonas

Ke Lloyd George kontraŭe al la postuloj de grafo Hertling, por la libera ŝipveturado fordoni siajn ŝipbazojn en la teritorio de fremdaj „malgrandaj nacioj“, kiel Gibraltaro, Malta, Aden, Hongkong, la Falkland-insulojn ktp., estis rifuzanta, ne alie estis atendeble. Anglujo ĉiam volas nur preni, sed ne doni. La fremdaj popoloj sub angla regado ja ne estas subigitaj, sed — „liberigitaj“! Ĝi, kiel konate, batalas ankaŭ nur por la liberigo kaj „sendependeco“ de la malgrandaj ŝtatoj — la granda, nobla, bona, bonanima Albiono! Nur la hispana ministroprezidanto *Maura* ŝajnas esti unu el la malmultaj, kiuj havas alian opinion. „Limburger Kourier“ en sia n-ro 63 citas, okaze de priparolado pri la anglaj ŝipbazoj, paroladon de ĉi tiu ministro el Aprilo 1917:

„Ne estas vere, ke estas batalate por la sendependeco de la malgrandaj ŝtatoj, same malmulte kiel estas batalate por la malgrandaj popoloj. Ne vere estas ankaŭ, ke oni per la milito volas fari finon al la militista hegemonio, ĉar la hegemonio surmara estas same militarismo kiel tiu surtera, kun la sola diferenco, ke ĝi povas eĉ etendiĝi trans la tutan mondon. La angla regado super Gibraltaro nin malhelpas je la regado de la propraj marbordo kaj akvaroj. Nia komunikado kun Hispana Maroko dependas de la bonvolo de Anglujo (Rimarko de la holando gazeto: Precize la sama okazas rilate al nia komunikado al Nederlanda Hindujo). Se la certigoj de Anglujo rilate al la memstarco de la malpli fortaj popoloj estas sinceraj, ĝi devas redoni la rabitan hispanan Gibraltaron al Hispanujo.“

Ja, se la certigoj de Anglujo estas sinceraj?!

Wilson pri Prusujo-Germanujo

kiel profesoro

(en sia libro „La Ŝtato“):

„La brilaj sukcesoj de Prusujo en la milito de 1870/71, kiu estis farata en la intereso de l'germana patriotismo kontraŭ franca impertinenteco, faris finon al la malvarmeta sinreteno de la centraj ŝtatpotencoj kontraŭ iliaj grandaj najbaroj en nordo.“

* * *

„Prusujo estas sukcesplene klopodinta, atingi pli grandan perfektecon en sia administra organizo ol iu alia ŝtato de Eŭropo . . .“

* * *

„La franca administrado suferas en ĉiuj siaj branĉoj kaj en ĉiuj servoj, de la plej malaltaj ĝis la plej altaj, je profunda korupcio sekve de la triumfo de l'fatala ideo, ke publika ofico estu donata kiel rekompenco por personaj aŭ partiaj servoj.“

kiel prezidanto


(en siaj ambasadoraj notoj kaj paroladoj):

„Pripensu, kio en Elzaso-Lotaringo okazis de kvardek jaroj. Jen ni havas tipan ekzemplon por tio, kio devas esti malhelpata, por restarigi daŭran pacon . . .“

* * *

„... Laŭ mia konvinko la terura milito neniam estus eksplodinta, se ĉiuj eŭropaj nacioj havus la saman demokratian reĝimon, kiun Francujo kaj Anglujo havas. La milito ekestis sekve de la decido de iaj aŭtokrataj registaroj kontraŭ la volo de popoloj. . . . Ni scias, ke konsidere al la organizita potenco de l'aŭtokrata registaro, tiu ĉi natura malamiko de la libereco, ne povas ekzisti ia sekureco por la demokratiaj registaroj de la mondo.“

(D. K. 214)



La unua germana aviada poŝtservo en Ukrainio

Por kiel eble plej rapide havigi sciigojn al la vastdistance disigitaj germanaj trupopartoj en Ukrainio, oni aranĝis aviadan poŝtservon disportantan la poŝtaĵojn.

Malbonaj profetoj

Al la profetoj, kiuj por la kvara militjaro, sekvanta la rifuzon de la germana pacpropono, antaŭdiris decidigajn venkojn de Entente, apartenas krom la politikistoj kaj militestroj de Entente ankaŭ multnombraj militverkistoj; ekz. la anglo Repington kaj la diversaj francaj generaloj kaj koloneloj, kiuj per la plumo por la jaro 1917 antaŭvidis tiel grandajn venkojn por siaj landoj. El la neŭtralaj ŝtatoj estu elektata la ekzemplo de *Kolonelo Feyler*.

El „Journal de Genève“ ni elprenas lian sekvantajn opini-esprimojn. La 30an de Aprilo 1917 li skribis:

„La centraj ŝtatpotencoj alproksimiĝas al elĉerpiĝo kaj jam nun kvazaŭ perdis la militon.“

La 7an de Majo 1917:

„Eĉ taktikaj sukcesoj, kiujn la germanoj atingas per revoko de trupoj el Ruslando, ne plu povas ŝanĝi la situacion. Germanujo tute troviĝas en la defensivo.“

La 1an de Aŭgusto 1917:

La germana-aŭstria ofensivo en 1917 estos same haltigata kiel tiu de 1915, tuj kiam la rusoj estos reordigintaj.“

La 30an de Aŭgusto 1917:

„Oni povas aserti, ke la sukcesoj de la italoj apud Isonzo kaj tiuj de la aliancanoj ĉe la okcidenta fronto pli frue alportos la pacon ol ĉiuj papaj eldiroj, kongresoj en Stockholm, paroladoj de la rusaj maksimalistoj kaj ĉiuj pacifistaj demonstracioj.“

La 11an de Septembro 1917:

La lasta franca sukceso meritas ĝeneralan atentadon. Ĉie, kie la germanoj renkontas militentuziasmigitan kaj bone armitan kontraŭulon, tie ili fariĝas ne kapablaj, dikti al li la leĝon de l'batalo. Ili perdis ĉian iniciativon.

La 4an de Oktobro 1917:

„Por la plua milito la Germana Imperio restos limigata je siaj propraj fortoj. Aŭstrio-Hungarujo kaj Bulgarujo pro defendaj konsideroj estas ne kapablaj, subteni Germanujon, nur Turkujo povus aliĝi al germana ofensivo.“

La 21an de Oktobro 1917:

„La germanaj konkeroj en la Baltika Maro ne plu povas ŝanĝi la situacion.“

La 30an de Oktobro 1917:

„Ofensivo en la alpa regiono estas nur ebla sur la komunikaj vojoj, sed tiokaze tre longedaŭra kaj sen ŝanco je ruiniga efiko.“

La 30an de Oktobro 1917 li skribis pri la itala malvenko apud Isonzo: „La malvenko ne povas esti politike decidiga, la italoj havas pli da ŝanco, rebonigi la situacion, ol la malamikoj ĝin fini feliĉe.“

Erari certe estas home. Sed tia amaso da rapide plimultiĝantaj eraroj, kiujn „Kolonelo“ Feyber faris kaj el kiuj ĉi tie nur malgranda nombro estas citata, supozigas tre malfortan militistan juĝpovon, aŭ naskas la suspekton pri ne neŭtrala raportado kaj erarigo de la publika opinio favore al Entente.

(D. K. 168)

Clémenceau la pilongiganto de l'milito

Eldiroj de la nuna franca ministro-prezidanto:

„... mi ekpensas, ke el ĉiuj ŝtatpotencoj Francujo estas la sola, kiu, por ne diri, ke ĝi deziras la militon, tamen sen granda bedaŭro ĝin vidus.“

(El la raporto de l'rusa ambasadoro grafo Benckendorff al Sasonov, de la 12a/25a de Februaro 1913.)

Ni konsentis, surpreni la regadon, por fari la militon per duobla streĉo.

(22an de Oktobro 1917)

* * *

Mi ne kredas, ke la kuniĝo de la nacioj estas la necesa ĉesigo de l'milito, ĉar mi ne konsentas la aliĝon de Germanujo al la societo de l'nacioj.

(Novembro 1918)

* * *

La unua principo estas tiu de la libereco, la dua tiu de l'milito kaj tiu, ke oni devas ĉion oferi al la milito, por certigi la triumfon de Francujo.

(9an de Marto 1918)

* * *

Mia devizo estas: Ĉie, eĉ en la interna politiko, mi militadas Mi daŭrigas la militadon, kaj mi daŭrigos ĝin ĝis la lasta kvaronhoro, ĉar la lasta kvaronhoro apartenos al ni!

(9an de Marto 1918)

* * *

Mi estas ravita! La angloj persistis, kaj ĉio iras plej bone!

(En fino de Marto 1918, dum la Granda Batalo en Francujo)

La batalo de Anglujo kontraŭ la germana industrio kaj la germanaj laboristoj

En la nordaj landoj oni disvastigas broŝuron „*The coming crash of Peace*“ (La venonta bankroto paca), kiu enhavas la reproduktajn de parolado de iu sinjoro T. C. Elder, kiun ĉi tiu faris antaŭ multnombra kaj respektata aŭskultantaro en Anglujo. Kiu kredas, ke la direktantaj rondoj trans la Kanalo dum la longaj militjaroj akiris novajn spertojn kaj iom reviziis sian militcelon, la ekonomian sufokon al Germanujo, tiu estos pli ĝuste informata, legante la frazojn same fanfaronajn kiel malamajn kaj absurdajn:

„Estus idente kun la neutileco de nia militlaboro, se la aliancanoj ne interkonsentos pri ia metodo, por malhelpi la germanojn, rekomenci la „negocojn kiel kutime“ (*business as usual*). Sed ne estas necese, paroli pri tio, ke la germanoj estu tute esceptataj el la negoco. Kontraŭe devus esti la celo de la aliancanoj, trudi al la germana popolo kiel tutaĵo monpunon, kiu, estante nacia ŝuldo, ricevas rangon antaŭ la militpruntaĵoj, pri kiuj oni aŭdas, ke ili estas disponebligitaj kun tiel mirinda facile.... Plue la aranĝoj de la aliancanoj devus celi tion, ke la germana popolo estu kondamnata al speco de pundoma laboro (*term of hard labour*), kaj tio en la senco, ke estas praktike ordonate al ĝi, kiuj branĉoj de industrio estas permesitaj al ĝi, aŭ ĉiukaze, kiuj industrioj ne estas permesitaj al ĝi. Ni posedas sufiĉe da signoj, kiuj devus servi al ni kiel averto kontraŭ stulta kaj milda toleremo rilate al nacio de blankaj sovaĝuloj en la koro de la kontinento. Elirante de tiu vidpunkto oni devus konsideri la germanan problemon en Eŭropo unue kiel la korelativajn de la negra problemon en Usono. Sed mi uzas ĉi tiun komparon, samtempe la amerikajn negrojn laŭdeve petante pri pardono.

Antaŭ aŭskultantaro kiel ĉi tiu, sperta pri la administro de la municia ministerio, mi volus diri, ke Germanujo devus esti malhelpata, okupi sin pri

fabrikado de materialo de la klaso A kaj plue tre malmulte da materialo de klaso B. Tio signifus, ke Germanujo ne havos arsenalojn kaj tre malmultajn branĉojn de industrio ne rekte kontribuantaj al la milita potenco. La pliparto de la loĝantaro ĉiukaze devus esti limigata por la fabrikado je industriaj fakoj de la klaso C, limiganta je agrikultura agado kaj industrio, kiujn ni povas kvalifiki kiel neniel malutilajn.

Sed mi eĉ ne momenton pensas, ke tia sistemo estu formulata kiel proklamo transdonota al la germana registaro kiel packondiĉo. La efiko povas kaj devas esti atingata per aliaj rimedoj, se la aliancanoj faros komunajn kaj bone pripensitajn disponojn, kiuj baziĝas sur la principo de komuna ekonomia ligo. Per leĝoj pri navigacio limigantaj la germanan ŝipiradon en la havenoj de la aliancanoj kaj per fiska konvencio (*fiscal convention*) povas esti perforte trudata al la malamiko de Eŭropo la efika pludaŭro de parta blokado.“

Mi opinas necesa, ankoraŭ unu fojon resumi al vi tiujn vidpunktojn en la sekvantaj proponoj:

1. Ke por la paco de la mondo estas necese, kiel eble plej malhelpi Germanujon, konservi sian antaŭan kaj nunan militistan potencon.
2. Por atingi tion, estas necese, trudi al la germana industrio limigojn kaj devigi la loĝantaron al paca perlaborado.
3. Ke tio povas esti atingata per internacia konvencio de la aliancanoj kaj de la brita regno.
4. Sed ke tio kondiĉas reconstruon (*reconstruction*) de la brita komerca politiko kun speciala konsidero de la ŝtala kaj maŝina industrioj.

Mr. Elder poste alvenas al la konkludo, ke „tia reformo“, kian li proponas, „devas esti akompanata de praktika percepto pri la komunaj interesoj de ĉiuj partoprenantaj en la brita ŝtala ktp. industrioj; kun koncentrado de ĉiuj fortoj flanke de la produktistoj por la celo de plivastigo

Milito kaj militado

La militaj okazintaĵoj en la tempo de l' 18a de Marto ĝis la 17a de Aprilo 1918

En *okcidento* matene de la 21a de Marto la germana infanterio en larĝaj sekcioj inter Croisilles (sudokcidente de Arras) kaj La Fère je ĉirkaŭ 80 km de la fronto, sub la persono ĉefkomando de Lia Majesto la imperiestro, alpaŝis al atako kontraŭ la tria kaj kvina anglaj armeoj, post kiam ses horojn antaŭe la artileria batalo kun plena fortego komenĉis sur preskaŭ la tuta okcidenta fronto. La malamiko, grave suferigita per artileria pafado kaj gaso, sekve de densa nebulo surprizita de la germana infanterio, dum la daŭro de la 21a kaj 22a ĉe la du nordaj apartenantaj al la armegrupo Rupprecht germanaj atakarmeoj de generaloj von Below kaj v. d. Marwitz estis elpelata el siaj du unuaj pozicioj, kies duan li defendis kun ekstrema obstino. La regantaj altaĵoj de la Cambrai-arko, antaŭ ĉio ĉe Flesquières, per ĉirkaŭado de norde kaj sude la 22a venis en la manon de la germanoj. Ĉe la suda atakarmeo de generalo von Hutier, — ĝi estis subordigita al la armegrupo de la germana kronprince —, la atako okcidente de St. Quentin jam la 22an vespere trarompis la trian malamikan pozicion, sude kontinue kun tio transpaŝis la kanalon Crozat kaj sekvigis kuratakan konkeron de la altaĵoj de La Fère, jam en paca tempo tre fortikigitaj. 25 000 kaptitoj kaj 400 pafilegoj estis la komputita kaptajo de la unuaj du tagoj. En la vespero de la 23a de Marto la linio etendiĝis norde trans Wancourt, Hénin-sur-Cojeul, tutproksime oriente de Bapaume kaj post kuniĝo de la armeoj von Below kaj Marwitz okcidente de la kuratake konkerita Peronne kaj Ham laŭlonge de la Somme. La tria malamika pozicio ĉie estis trarompita, malesperaj kontraŭatakoj sur la tuta fronto sange

de la transoceana negoco.“ Lia flama alvoko, tute ne al liberigo al la malfortaj popoloj, al batalo pro Belgujo, Elzaso-Lotaringo, Armenujo ktp., sed al streĉa plenigo de la angla monujo, finiĝas per la melankolie antaŭtimaj vortoj:

„Mi esperas, ke miaj proponoj estos subtenataj de ĉi tiu influrica kunveno, se mi asertas, ke havas urĝan nacian gravon koncerne la tutan loĝantaron de nia regno, studi tiujn demandojn kaj laŭ eblo nun decidi.“

Feliĉe tiu „decido“ ne estos farata sole de sinjoro Elder kaj lia „influrica kunveno“! Sed karakteriza estas tiu speco de propagando, kiun la angloj, timante nenian penon kaj monelspezon, aranĝas ankaŭ en la neŭtrala eksterlando. Se tiaj naivajoj estus disvastigataj en London-aj pencogazetoj, por influi kaj forigi la kredemajn amasojn, tio estus nenio nekutima en la lando de l' mensogoj kaj hipokrito. Sed inter la neŭtraluloj cirkuligi flugtraktaĵojn, kies tendenco ankaŭ pere estas direktita kontraŭ la nacioj starantaj flanke de la milito, signifas provon, kiun prudentuloj en tiuj landoj konvene taksos. Pri la kapableco de lordo Northcliffe por lia propaganda posteno per tio ne estas donata atesto speciale bona.

[D. K. 217]

Franca militgazeto en germana lingvo

Kiam la francaj trupoj ĉe komenco de l' milito tuj invadis en la sudan angulon de Elzaso, kie ili ankoraŭ nun okupas malgrandan parton en la Vogezoj, montriĝis, ke ĉiu komprenebleco mankis inter la francaj soldatoj kaj la loĝantaro. Oni nun fervore klopodas, por forigi ĉi tiun mankon. La instruado nun kiel antaŭe devas okazi en germana lingvo, ĉar ĝi estas la sola, kiun la infanoj scipovas tiel, ke ili povas sekvi la instruadon. La francoj cetere en la malgrandega parto de Elzaso-Lotaringo, kiun ili tenas okupita, eldonas militgazeton, de la unua ĝis la lasta litero presitan en germana lingvo. Sed malgraŭ tio ili faras pretendojn pri tiu „franca lando“!

[D. K. 203]

frakasiĝintaj. Francaj regimentoj, de sudokcidente aljetitaj por kontraŭ-atako kontraŭ la kanalo Crozat, kun gravaj perdoj estis repelataj al Chauny. Furiozaj bataloj pro la regantaj altaĵoj ĉe Bapaume kaj Nesle kaj pro Chauny plenis la 24an. Ĉiuj tri urboj ĝis la nokto estis prenitaj de la germanoj. La nombro de la kaptitoj estis altiĝinta ĝis pli ol 45 000, la kaptajo ĝis multe pli ol 600 pafilegoj kaj miloj da maŝinpafiloj. La anglo, la 25an ankoraŭ pro ĉiu vilaĝo plej obstine batalanta, senindulge antaŭenjetiganta por kontraŭatako, de post la frumateno de la 26a komencis larĝafronte ĉe ambaŭ flankoj de la Somme cedi tra la pafkavajaro de la Somme-batalo en 1916. La ĉefstabejo de la 3a angla armeo, Albert, post perbatalado de la transiro trans Ancre norde kaj sude de la urbo vespere venis en la manon de la germanoj. La 25an al la francaj divizioj alkondukitaj el Noyon post penega batalo estis elŝirataj la altaĵoj norde de Noyon kaj la 26an la urbo mem en sanga stratbatalo. La germanaj pozicioj de antaŭ la komenciĝo de la Somme-batalo jam la 26an estis transpaŝitaj en multaj segmentoj. Anglaj provoj, la 27an per nove alkondukitaj divizioj konkeri la gravan staplejon Albert, sange frakasiĝis sur la altaĵoj okcidente de la urbo. La armeo de Hutier en tiu tago kun la okupo al Montdidier kaj Pierrepont atingis enrompan profundon de 60 km. Kun la konkeri al Montdidier ĝi samtempe tratranĉis la kvarreparan fervojan komunikon de Paris al Amiens. La 28an de Marto en loka plivastigo de la atako estis prenataj la anglaj pozicioj okcidente kaj nordokcidente de Arras, kaj per tio la malamiko estis senigata je preskaŭ la tuta gajnajo de la plurmonata Arras-batalo en 1917. Arras ree kuŝas en pafitrafeblo antaŭ la germanaj pozicioj. La ataka fronto la 29an etendiĝis trans Bailleul, Tilloy, Mercatel, Ayette, Hébuterne, Beaumont-Hamel, okcidente de Albert, Saily, Warfusée-Abencourt, okcidente de Pierrepont kaj Montdidier, poste fleksiĝis orienten

kaj iris norde de Assainvillers, trans Roye-sur-Matz, Lassigny, sude de Noyon, poste laŭlonge de la Oise ĝis la elira pozicio.

Sur la norda parto de la batalfronto ĝis la Somme nun ekestis halto de la atako. Artilerio, municio, materialo kaj nutraĵoj devis esti antaŭe alportataj, por certigi la sukcesojn. Ne konsiderante ĉiujn perdojn, la anglo de tiam provis rekonkeri de la germanoj la gajnitan teritorion. Liaj senindulgaj atakoj en neniu loko povis alkonduki delokigon de la linioj.

Sed sude de Somme la atako konservis sian movenergion kaj en penplenaj bataloj kondukis la germanajn diviziojn pluen renkonte al la ĉefcentro de la angla armeo, Amiens. Sur la fronto de Moreuil ĝis Noyon ili la 30an kaj 31an de Marto faris enpuŝon en la porbatalan disvolviĝon de la francaj korpusoj, rapideme kondukita al la batalfronto, kaj kaŭzis al ĝi konfuzon. Demuin kaj Moreuil estis la okazejoj de obstinaj bataloj. La rivervaĵoj de Avre kaj Don estis batale transpaŝataj, la altaĵoj sur la okcidenta bordo kuratake prenataj. Sur la direktita al sudo parto de la fronto de Montdidier ĝis Noyon la trupoj de generalo von Hutier la 30an repelis la malamikon el liaj freŝe fositaj tranĉeoj al Mesnil—St. Georges, Assainvillers, Rollot, Hainvillers, Thiescourt kaj Ville. Sude de Noyon ili kuratake konkeris la regantan fortikaĵeton Renaud. Plurfojaj atakoj de la malamiko rompiĝis kontraŭ la novaj linioj de la germanoj. Ankaŭ en la sekvantaj tagoj ĝis la 3a de Aprilo la franco provis vane, subtenate de la anglo, reenpremi la germanajn liniojn, ĉe kio la altaĵoj sudoriente de Moreuil estis speciale fortege probatalataj. La 4an de Aprilo germanaj divizioj ankoraŭ unu fojon inter Saily kaj Montdidier repelis la malamikon, malespere sin defendantan. Villers-Bretonneux, Castel, Mailly restis en la mano de la germanoj. Amiens ĝis 13 km estis proksimiĝinta al la germanaj linioj. La nombro de la kaptitoj estis plialtiĝinta ĝis pli ol 90 000, la nombro de la batalprenitaj pafilegoj ĝis pli ol 1300.

La 4an de Aprilo la ofensivaj agadoj de la germanaj atakarmeoj ĉi tie atingis sian provizoran finon. Post kiam en la sekvantaj tagoj la malamikaj kontraŭatakoj frakasiĝis kun plej gravaj sangaj perdoj, unueca batalo sur la fronto Arras—Noyon ĝis nun ne plu okazis. Sed de la 6a ĝis 9a de Aprilo la germana armeo de generalo von Boehn forigis la profundan angulon ĉe St. Gobain per atako de St. Gobain ĝis Brancourt. Post la kurataka konkeri de la alte lokita Coucy-le-Château en la mateno de la 9a la germana linio etendiĝas tie ĉe la kanalo Ailette, la Ailette kaj ĉe la kanalo Oise—Aisne.

En la sama tago ree plene surprize por la angla armeestraro komenciĝis en Artois nova atako de la armeo de generalo von Quast inter Armentières kaj la kanalo La-Bassée, kiu post mallonga pafada preparo repelis la kontraŭulon en la du unuaj tagoj multloke trans la Lys kaj la Lawe. Malmulte da kilometroj norde de tiu enrompejo la armeo de generalo Sixt von Arnim la 19an de Aprilo atakis inter Hollebeke kaj Frelinghem kaj prenis Messines. Ĉirkaŭbarite de tri flankoj, la 11an la tre fortikigita Armentières kapitulacis kun 3000 soldatoj. Locon, Merville, Steenwerck kaj Ploegsteert en tiu sama tago markis la limon de la enrompo. La kunigo de la du atakejoj per tio estis efektivigita. 20 000 kaptitoj kaj pli ol 200 pafilegoj jam la 11an estis la germana akiraĵo. La anglo, grave suferinta sekve de plej obstina kontraŭstaro, nun alkondukis al tiu batalfronto ĉiom da rezervoj ankoraŭ forpreneblaj, parte per aŭtomobiloj. En malfacilaj bataloj, pli kaj pli koncentriĝantaj al la fronto de Merris ĝis Wyt-schaete, loko post loko estis forŝirata al li. La grava Bailleul kaj la obstine probatalita en 1917 Wyt-schaete konkeriĝis la 16an. En la sama tago okcidente de Bailleux francoj ankaŭ ĉi tie estis konstatataj en la fronto. La 17an de Aprilo la anglo, minacate de sude, malokupis siajn antaŭajn poziciojn ĉe la Ypern-arko. En baltalkonto kun la cedanta malamiko

la trupoj de generalo von Quast sekvis trans Poelkappelle, Langemarck kaj Zonnebeke, kiuj estis prenataj la 17an.

En la unuaj 4 semajnoj de la germana ofensivo Entente perdis 4000 kvadratkilometrojn da franca kaj belga tero, t. e. preskaŭ ĉiuj sukcesoj akiritaj en la jaroj 1916 kaj 1917. Ĉiuj klopodoj de la angloj kaj francoj ne sukcesis haltigi la germanan puŝon. Paris estas konstante minacata per la fronto ĉe Montdidier—Noyon, Amiens kuŝas sub la pafado de germanaj kamphaŭbizoj. La ĉefkomandanto de la trupoj de Entente, generalo Foch, koncerne siajn agojn jam nun ne eble estas katenita al la germanaj disponoj. La perdoj de la anglaj-francaj trupoj laŭ la propraj informoj de la raportistoj de Entente estas eksterordinare gravaj.

Samtempe kun la komenco de la ofensivo germanaj malproksimpafaj kanonoj komencis surpafi la fortikaĵon Paris. Por venĝi la surpafadon al Laon, komencitan la 29an de Marto de la francoj, la germana artilerio de post la 4a de Aprilo surpafas Reims. Peza artileria pafado kuŝas kun mallongaj paŭzoj de la 21a de Marto sur la batalejo ĉe Verdun kaj en Lotaringo. La infanteria agado tie ĝis nun limiĝis je entreprenoj de puŝtrupoj.

La germanaj helpekspedicioj en *Finnlando* kaj *Ukraino* bone progresis. La 3an de Aprilo en Finnlando Hangö estis okupata de germanaj trupoj, la 14an de Aprilo Helsingfors. La 15an de Aprilo taĉmentoj surbordiĝintaj en Lovisa oriente de Lahtis atingis la fervojon kondukantan de Tammerfors al Wiborg. Ĉe la okupo al Tammerfors per la Blanka Gvardio la 6an de Aprilo 10 000 kaptitoj venis en ĝian manon.

En *Ukraino* trupoj de generalo Kosch okupis la havenurbon Ĉerson. La 4an de Aprilo Jekaterinoslav, la 8an de Aprilo Ĥarkov estis prenataj post batalo.

En *Macedonio*, krom iom granda batalo en la ebenaĵo de Struma la 16an de Aprilo, nenio raportinda

okazis. La bulgaroj ĉe tio kaptis 166 anglojn.

En *Armenujo* la turkoj efektivigis sian antaŭenmarŝon en la distriktojn Batum, Kars kaj Ardahan. De post la kapitulaco de Batum, la 14an de Aprilo, la lando kredeble estas ilia certa posedaĵo.

En *Palestino* atako de la angloj, fine de Marto okazinta trans Es Salt kaj kontraŭ Amman, en la unuaj tagoj de Aprilo kun gravaj sangaj perdoj de la malamiko estis rebatata ĝis la Jordano. Anglaj atakoj okcidente de la strato Jerusaleem—Nablus restis sen-sukcesaj. En *Mezopotamio* la angloj faris surprizan antaŭenpuŝon de el Hit ĝis Chan-Baghdadi, tie venkis la 26an de Marto la turkan batalforton kaj persekutante venis ĝis punkto 13

anglajn mejlojn supre de Beni Anan ĉe la Eŭfrato.

El *Italujo* neniu okazaĵo de pli granda gravo estas anoncbla. [Kch. IV. 18]

La rezulto de l' ne limigita U-boata milito en Aprilo 1918


(Oficiale) — Berlin, 21. 5. 1918.

Dum la monato Aprilo entute 652 000 kuntaraj registro-tunoj de la utiligebla por niaj malamikoj komerca ŝipvolumeno estas detruitaj.

La disponebla al ili tutmonda komerca ŝipvolumeno do sole per militaj aranĝoj de post militkomenco malpliĝis je proksimume

17 116 000 kuntaraj registro-tunoj.

La ĉefo de l' admiralstabo de la marino



La komenciĝo de l' 30-jara milito

Antaŭ 300 jaroj, la 23an de Majo 1618, okazis la malbonfama „trafenestra elŝeto“ en Praha. Ĉi tiu politika epizodo en la tiamaj religiaj konfliktoj en Bohemujo donis la kaŭzon por la komenciĝo de la multjara milito dezertiginta germanajn provincojn kaj urbojn, ĝis kiam la paciĝo en Münster (Vestfalia), la 24an de Oktobro 1648, finis la militstaton. Nia bildo montras la momenton, en kiu la du malŝatataj gubernistoj, Martinic kaj Slavata, kaj la sekretario Fabricius estas elŝetataj el la fenestroj de la imperiestra kastelo. Ili falis sur sterkamason kaj restis vivantaj.

Kiel francaj soldatoj malbon-kondutas en la propa lando

De preskaŭ kvar jaroj la francaj gazetoj en ĉiu eldono rakontas al siaj legantoj la plej ne kredeblajn historiojn pri la krudeco de la germanaj soldatoj. Precipe, kiel malbone ili kondutas en la okupitaj regionoj de Nordfrancujo, turmentas la malfeliĉajn loĝantojn, sencece ĉion detruas kaj ŝtelas ĉion ŝtebleblan. En vero tio estas tute alia. La malmultaj restintoj en la okupitaj de ni lokoj ne nur ĝuas la plej grandan prizorgon de niaj trupestroj, sed grandparte rapide ekestas bona interrilato inter la loĝantoj kaj niaj soldatoj. Plej multe ĉi tiuj estas ekkonataj kiel ŝirmantoj alportantaj trankvilon, al kiuj la loĝantaro baldaŭ ekhavas konfidon. Tio ne estas miriga, — se oni aŭdas, kiel la propaj trupoj de niaj malamikoj kondutas en la militregiono.

La franco Toussaint B. el E... , militpartopreninto el 1870/71, kiu siatempe estis en kaptiteco en Koblenz kaj tie troviĝis antaŭ la konkero al E... per la germanoj, eldiris por protokolo pri la konduto de l' malamiko la jenon: „Kiam en Marto de 1917, post kiam la germanoj estis sin retirintaj, mi denove revenis al E... , mi tie renkontis partojn de la franca armeo. Mi tiam ankoraŭ ne tiel precize konis la germanojn, ĉar mi kunvenis kun ili nur dum mia civila mallibereco en Rastatt.

Post kiam nun la francaj soldatoj de post Marto 1917 denove estis en E... , multe pli da plendoj laŭtigis de la civilaj loĝantoj pri tio, ke de niaj soldatoj estis pli multe ŝtelate kaj rabate, ol la germanoj tion faris.

Proksimume en Julio 1917 la francaj soldatoj estis anstataŭigataj de la angloj, kaj de post tiu tempo nur anglaj soldatoj ankoraŭ troviĝis en E... De post tiu ĉi tempo ni ne plu estis tiom liberaj. La angla polico estis tre severa. Ni rajtis malproksimigi nin de E... nur tri kilometrojn. Por povi iri ekz. al Noyon, Lagny aŭ Roye, ni bezonis pasaĝeran bileton. Ĉiufoje tiu ĉi devis esti petpostulata 14 tagojn antaŭe, kaj tia-

maniere oni ofte en kazoj de rapido ne povis fari tiajn vojaĝojn senpune. Kutime monpuno de 25 frankoj estis fiksata.

La 22an aŭ 23an de Marto 1918 oni subite rakontis en E... , ke la germanoj trarompis la anglajn liniojn kaj marŝas kontraŭ Ham. En tiuj ĉi tagoj la francoj ree anstataŭigis la anglojn en E... Unue ne multe da francoj tie estis. Dimanĉon, la 24an de Marto 1918, kontraŭ la 11a horo antaŭtagmeze, venis la ĝendarmoj kaj ordonis al la loĝantoj de E... , tuj forlasi la lokon. Mi do tuj enpakis miajn aĵojn, por forkuri. Sed antaŭe mi volis ankoraŭ reguligi miajn aferojn kun viro en E... Post mallonga foresto denove revenante en mian domon, mi trovis mian kofron rompe malfermita kaj ĝian enhavon elrabita. Miajn paperojn ili estis forbruligitaj. Ĉi tio estas farita de francaj soldatoj, kiuj estis enloĝigitaj en mian domon. Krom tio ili forŝtelis de mi 600 frankojn. Mi nun iris al la leŭtenanto, por plendi pri tio; tiu ĉi irigis min al la kapitano, kaj la kapitano sendis min akompanatan de kvar soldatoj kun starigita bajoneto al la kolonelo, ĉar intertempe aliaj aferoj okazis. Dum tiu ĉi tempo la civilaj loĝantoj preskaŭ ĉiuj jam estis enigitaj en ŝarĝaŭtomobilojn kaj forveturigitaj. Mi rapide rekuris en mian domon, por alporti ankoraŭ mian malmultan havaĵon. Kiam mi ree alvenis tie, kie la fortransporto per ŝarĝaŭtomobilo okazis, oni deklaris al mi, ke ĉiuj homoj jam forestas kaj mi nun devas resti tie ĉi. Mi nun restis en E... kaj, post kiam ĉiuj loĝantoj forestis, mi havis la plej bonan okazon vidi, kiel kruele la francaj soldatoj kondutis en la forlasitaj domoj. Ĉio estis traesplorata kaj traserĉata kaj malordigata. Kio ajn estis valorajo kaj povis esti kunportata, estis ŝtelata.

La loko jam prezentis malĝojigan aspekton, kiam la germanoj enmarŝis.

Mi estas okulatestanto de tiuj ĉi okazintaĵoj. Miaj eldiroj baziĝas sur senkondiĉa vero.

La rezulto de l' demandadoj al tiu ĉi restinta franco denove liveras

la pruvon pri la sendisciplineco de francaj soldatoj. Ili ne abomenas, plej senhonte elrabadi la bedaŭrindajn loĝantojn de francaj lokoj, siajn proprajn samlandanojn, antaŭ ol lasi ilin al ilia sorto.


Kiel do tiu ĉi soldataro kondukus, se ĝi estus sukcesinta enpenetri en germanan teritorion?! (D. K. 223)

„Germana barbaro“

„Mi, subskribinto, *Louis Crombez*, loĝanta en Mons, Rue du Gouvernement 19, plenumas devon de dankemo, informante la imperiestran germanan armeon pri oferema faro de la soldato *Wilhelm Hoepf*, kiu nuntempe loĝas en Rue du Gouvernement 16. Sabaton, la 17an n. m., mia fratino falegis en cisternon, kaj ĉi tiu juna viro sola kaj kun danĝero por sia vivo laboris longtempe por savi ŝin. Ĉe la okzintaĵo ĉi tiu soldato malvolvis energion, sinforĝeson kaj homamon, kiuj estas

indaj por ĉiu laŭdo, kaj ĉar bedaŭrinde ne konvenas al mi, doni al li honoran rekompencan, konforman al lia sinofero, mi permesas al mi, urĝe rekomendi lin al favora priatento de la imperiestra armeo, por ke li ricevu la distingon, kiun li meritas por sia tiom energia, meritplena kaj humana faro. Mons, la 23an de Novembro 1917 L. Crombez.“

Ĉi tiu skribaĵo estis transdonata al la germana estraro de belga flanko el propra instigo kaj parolas por si mem. Estas nur unu el la multaj ekzemploj, kiamaniere la germana soldato ankaŭ en malamika lando en simpla komprenebleco plenumas sian homan devon kaj kiamaniere per sia malegoismo li hontigas tiujn, kiuj volas atribui al li ĉiujn nur elpenseblajn kruelajn kaj malbonfarojn. — La supre nomita soldato *Wilhelm Hoepf*, pioniro, estas librobindisto kaj naskiĝis la 2an de Decembro 1894 en *Kaiserslautern* kiel filo de komercisto. (D. K. 171)



Hotelo „Weißer Schwan“ (blanka cigno) en Frankfurt a. M. En ĉi tiu historia domo oni la 10an de Majo 1871 subskribis la packontrakton inter Francujo kaj Germanujo.

La mensoga milito

„Se kalumnio eĉ pasas, ĝi ĉiam ion lasas“

Kiarimede la amerikanoj provas eksciti sian ne militeman publikan opinion, montras la gazetaro de *Newyork*.

Jen ni ekz. legas en *Wallstreet-Journal* de la 5a de Novembro:

Pro kio Germanujo batalas? La germana imperiestro tion diris al ni en sia proklamo al la armeo komence de l' jaro 1915, en kiu estis legeble: „La triumfo de la pli granda Germanujo, kiu iutage devas regi la tutan Eŭropon, estas la militeco, pro kiu ni batalas.“

Plue, en Julio 1914 la imperiestro laŭ la gazeto diris (La citiloj estas el *Wallstreet-Journal*):

„De post mia infaneco mi estis sub la influo de kvin grandaj viroj, Aleksandro, Julio Cezaro, Theodorico la (jen!), Frederiko Granda kaj Napoleono. Ĉiu revis la revon pri mondestreco, sed sen sukceso. Mi revas la revon pri germana mondestreco, kaj mia kirasita pugno (jen!) realigu ĝin.“

Plue la sama gazeto poste en alia numero citas el laŭdira libro de iu sinjoro Ritter (!), laŭaserte publikigita en 1916. Tiu dubebla aŭtoritato laŭdire skribis:

„Neniu unueca kaj potenca Mezeŭropo estas ebla tiel longe, kiel Francujo konservas sian nunan grandecon kaj potencon. La objekto de ĉiu pactraktato devas esti, rabi de Francujo tiun potencon. Nacioj povas esti pereigataj per kontribuoj aŭ komercaj kontraktoj; sed pri tiaj ni nun ne parolas. Ni simple postulas, kiuj teritoriaj transcedoj estas necesaj, por malpliigi la nombron de la eŭropaj grandpotencoj je du.“

„Ĉu pri la cedo de nordaj marhavenoj povas esti parolate, estas demando en la nuna momento pli bone ne diskutata. Eble la centraj ŝtatpotencoj bezonas havenon ĉe la Mediteranea Maro, ekz. Toulon; tio inkludas la anekson de Nice...“

„Francujo devas perdi la tutan Nordan Afrikon, ĉar ĝi ne sufiĉe kripliĝus per kontribuoj, nek sufiĉus postuli la cedon de la franca ŝiparo. La francaj fortikaĵoj ŝirmantaj la francajn havenojn devas esti malkonstruataj.“ kpt.

La aŭtoritato ĉi tie citata, por pentri al la iom naŭva pri geografiaj precizajoj amerika publiko la germanan nesatigeblan en ĝusta lumo, supozeble devus esti serĉata en frenezulejo, se li ne eĉ dungite kaj pagate de niaj malamikoj elpensas tian konfuzajon.

Malnova recepto: „Se kalumnio eĉ pasas, ĝi ĉiam ion lasas.“

(N. A. Z. 16)

La morto de Richthofen kaj la francoj

Oni rajtis esperi, ke ĉe la tombo de la plej kuraĝa kaj plej sukcesa el ĉiuj batalaviadistoj silentus malami-keco, malamo kaj kalumnio kaj ke en la mortinto oni ne vidus la malamatan kontraŭulon, sed respektus lin kiel majstron falintan en kavalira batalo. La raportoĵo pri la inda enterigo, kiun la anglaj aviadistoj havigis al li, kaj anglaj gazetvoĉoj, ekz. de „*The Times*“ de l' 22a de Aprilo kaj de „*Westminster Gazette*“ de l' 23a de Aprilo, fortigas en ni tiun esperon. Sed al la francoj estis rezervite, forigi ĝin.

La francaj gazetoj, antaŭ ĉiuj „*Le Matin*“ de l' 23a de Aprilo, faras ĉion eblan, por senhonorigi la bildon de la mortinta heroo per malicaj rimarkigoj. Ili pridubas la nombron de liaj venkoj. Liajn venkojn oni aljuĝas malpli al li ol al lia taĉmento, kiu laŭdire persekutis liajn viktimojn, ĝis kiam li, laŭ la diro de „*Temps*“, povis „doni al ili la faligan pafon“. Siajn venkojn li atingis, kiel precipe „*Matin*“ akcentas, „neniam sola“ aŭ en egala batalo, sed per plinombro kontraŭ la unopa kontraŭulo. Okaze lia tuta agado kiel batalaviadisto eĉ estas stampata kiel elpensajo de germanaj timo kaj embaraso. Krom tio laŭtigas la kutimaj insultoj kontraŭ la germanaj aviadistoj ĝenerale kaj kontraŭ *Richthofen*, la „estro de la ruĝaj piratoj“ aparte.

Estas malfacile kompreni, kiel popolo, iam fiero pri sia kavalireco, tiel plene estas forlasinta sian dignon. Ni kontentigas nin per tio, konstati la insultojn kaj lasi ilin al la juĝo de

la mondo. Ĝia juĝo akordiĝos kun la nia: la francoj volis senhonorigi la mortinton, sed ili senhonorigis sin mem.

(N. A. Z. 240)

Franca falsado

Kiujn falsistajn artifaĵojn la franca gazetaro aplikas en sia mizero, provas tute ne unuopa publikigo en „Oeuvre“ de 120a de Marto 1918. La ĵurnalo represas en unua loko per plej grasaj literoj laŭdiran parolon de Maximilian Harden en „Zukunft“. La citita frazo efektive trovas sin en n-ro 14 de „Zukunft“ de 12a de Marto 1918, sur paĝoj 390/91. Sed ĝi ne estas eldiro de Harden mem, sed citaĵo el parolado de Wilson. La nomo de la amerika prezidanto evidente al „Oeuvre“ ne plu ŝajnas esti sufiĉe efika.

(N. A. Z. 190)

El la legantaro

„La barbaroj“ ĉe Thames
Fragmentoj el speciala korespondanĵo
al „Stockholms Dagblad“
(Traduko el la sveda)

Jam kiam ni komencis la rondiron tra la kaptitejo, mi demandis al mia gvidanto, per kio la kaptitoj distras sin dum la longaj tagoj.

Li tiam montris al grupo el almenaŭ 50 viroj, kiu kun du gardistoj faris longan promenon sur la kamparon — en ĝi ĉiu, kiu deziras tion, povas partopreni ĉi-matene — kaj plue al alia grupo, kiu ludas piedpilkon sur bonega ebenaĵo en la kaptitejo kaj kies kapitano ŝerce diris al mi: Se ni ne batos la anglojn alimaniere, ni almenaŭ dum ni estas tie ĉi lernos bati ilin je piedpilkon.

Kiam ni eniris en unu el la ĉambroj, tie pasis energia konkurludo je endoma teniso, kaj ĉe tiu konkuro la akompanintaj min oficiraj efektive entuziasmiĝis. Ili bedaŭris fervore, ke ili venis ĝenante, sed povis tamen ne foriri tuj, sed restis ne mallongan tempton rigardante.

Tiuj plezuroj tamen estis nur distraĵoj kaj bagateloj kompare kun tio, je kio la germanoj cetere okupiĝas, kaj kies vido estas mia ĉefa memoro el tiu ĉi kaptitejo. Estis laboro, legado, studoj. En ĉiu el la ĉambroj oni legis — zumis

kvazaŭ en abelujo, kiam pordo al ĉambrego estis malfermata, kaj ĉie oni vidis virojn klinitajn super siaj libroj, notskribajoj, skriptaĵoj.

Mi estis pli kaj pli mirigata kaj diris tion al la majoro.

— Jes, li diris, estas vere mirinde, kiom ili laboras kaj legas. Precize kvazaŭ ili venis tien ĉi nur por studi, kaj ĉi-okaze ili evidente intencas bone uzi la tempon.

Sed mi estis mirigota ankoraŭ pli.

Jam ĉe la alveno al la kaptitejo ŝajnis al mi, ke mi aŭdas muzikon el la malproksimo, kaj longtempe ĝi aŭdiĝis jen malproksime, jen pli proksime. Tiel ĝi plifortiĝis, kaj ĝuste tiam la majoro diris: „Nun vi vidos ion!“ malfermante la pordon al pli granda ĉambro.

Tie sur estrado sidis violonorkesto el dudek kvin viroj — germanaj kaptitoj — matene je la 8a kaj duono, ludante la uverturon de Tannhäuser.

Solene kaj grandioze sonis la muziko — ĉiu partoprenis kun evidente plenaj atentvigleco kaj inklino, kaj kaptite de la sentimpreso ni aŭskultis je serioza atendado la tonojn de la Wagner-a muziko.

Kiam la pordo rec estis fermita post ni, mi ne povis kontraŭstari, diri al la majoro:

— Ĉi tion anglaj kaptitoj en Germanujo ne estus farantaj.

— Certe ne, je tio vi estas tre prava, la majoro respondis ridante.

Sed estis io plua, kion mi penis, sed ne diris. La vorto barbaroj haltis sur miaj lipoj, kaj ŝajnis al mi, ke tiu nomo ne konvenas almenaŭ al tiuj ĉi sciofantaj viroj. En tiuj pensoj mi diris al mia gvidanto:

— Sed, majoro, ĉu vi eble ne kredas, ke la nomo barbaroj al tiuj ĉi viroj povas supozeble enhavi iun el tiuj troigoj aŭ erartakoj, je kiuj ĉiu popolo en milittempo — nun kiel ĉiam — estas kulpa?

La majoro kelkmomente rigardis min akre, elprenis tiam sian pipon, tabakŝargis ĝin, ekbruligis, kaj elblovis mediteme kelkajn fumnubetojn.

— Jes, eble, li diris malrapide, kiam sammomente la tonoj de la finaĵo de Tannhäuser sonis tra iu malfermita pordo en la belan aŭtunmatenon ĉe la bordo de Tamiso.

Sveda leganto

Renovigu la abonon!


Redakcia korespondo

K. R. en D. (Holando) — Vi estas prava: Inter la paroloj kaj faroj de prezidanto Wilson ekzistas granda diferenco. Li predikas demokration, liberecon kpt., kiuj laŭdire regas en la landoj de Entente — inklusive Usonon — kaj kiujn Wilson volas havigi al la politike senrajta germana popolo. Sed en realeco la germana popolo jam estas pli libera ol la usona. Nia imperiestro laŭleĝe ne posedas la potencon, kiun Wilson nun havas kaj senindulge uzas en sia ŝtataro. La nuna regado en Usono eĉ ne estas ombro de vera demokratio. Vere, tian sistemon ni danke malakceptas. Saluton!

G. F. en K. (Norvegujo) — Vere, estas malĝojiga ĉapitro en la granda dramo de 1' mondmilito, kiel Entente premas la

malgrandajn naciojn, kiuj deziras resti neŭtralaj. Speciale malnoble estas, ke oni kulpigas Germanujon pri la malbona situacio de la neŭtralulo. Ĉu Germanujo rabas viajn ŝipojn por propra uzo? Ne! Ĉu Germanujo limigas kaj kontrolas vian eksterlandan komercon? Ne! Laŭdinde estas, ke ankaŭ inter viaj samlandanoj estas sufiĉe multaj, kiuj objekte rigardas la situacion kaj komprenas, kiu estas la vera premeanto de la malgrandaj nacioj. Saluton!

E. T. en L. (Svislando) — Vian „mizerkion“ ni bone komprenas. Via nutrada situacio efektive ŝajnas esti ankoraŭ pli malbona ol la nia — dank' al la „protektantoj“ de la neŭtralaj popoloj. Oni promesas al vi ĉion eblan, sed ne plenumas sian promeson, laŭdire pro la danĝero de la germanaj U-boatoj. Ĉi tio estas hipokrita protekto, kiu kaŭ la nepovon aŭ — la nevolon. Samideanan saluton!



La malsukcesinta surprizatako de la angloj kontraŭ Zeebrügge
Surprize atakante la germanan U-boat-bazon de Zeebrügge la angloj surfundigis du malnovajn anglajn krozoŝipojn antaŭ la haveneniro, por malhelpi la el-kaj enveturadon de la germanaj ŝipoj. Sed ili ne atingis sian celon. Nia bildo montras la du surfundigitajn krozoŝipojn, sed ankaŭ la liberan velurveturon inter ili, sufiĉe larĝan por senmalhelpa ŝipveturado.

Pro kio?

Internacia kriminal-romano
originale verkita de *Argus*

(5a daŭrigo)

„Saĝa antaŭzorgo! Kaj ĉu por tiu entrepreno li kelkafoje faras vojaĝojn?”

„Li almenaŭ uzas ĉi tiun negocan celon kiel pretekston por amuzvojaĝoj al Eŭropo.”

„Ĉiukaze ni devos iom precize rigardi tiun sinjoron Jameson en Wien. Eble sufiĉos provizore, se ni sendos tien mian suboficiston Kruse.”

„Ĉu tiu tasko ne postulas altan gradon da inteligenteco?”

„Por la provizoraj konstatoj ne. Ĉi tiuj versaĵne estos rapide plenumblaj, eble jam per telegramo al la polica direkcio en Wien. Jes, tio sufiĉos unue, ĉar, se mia konjekto, ke tie li volas havigi al si alibion, estas ĝusta, li devas esti anoncinta sin tie kiel Franco Jameson. Mi tuj volas redakti tian telegramon kaj sendi ĝin al Wien.”

Moser faris tion. „Ĉu vi estas preta, post ricevo de la respondo de Pinkerton tuj forvojaĝi per la plej proksima vagonaro?” li poste demandis.

„Ĉiumomente mi estas preta.”

„Des pli bone. Tiun amikon de la patro de sinjorino Smith ni devas trovi.”

„Ĉu vi vere kredas, ke tiu ekzistas?”

„Certe, ĉar Jameson mem estas la amiko. Ĝuste pro tio estas valore, ke vi akompanos min. Vi esploru lin.”

„Ĉu nur pro tio?”

Ŝi iomete ruĝiĝis, elparolinte la ne pripensitajn vortojn, kaj rapide aldiris: „Mi pensis, ke por vi estus enuige, ĉiam vojaĝi tute sola. Aŭ ĉu vi ankaŭ bone konversacias kun via Kruse?”

„Vi havas tro bonan guston, estimata fraŭlino,” li diris trankvile, „por voli elvoki flataĵojn. Tial vi ne per-

ceptos kiel tian, se mi diras al vi, ke mi nenion deziras pli forte, ol ĉiam havi tian akompanantinon sur miaj vojaĝoj, tute ne konsiderante la kroman utilon, kiun mi akiras el la interparolo kun vi pri la krimo.”

„Tio tamen sonas kiel flataĵo. Mi konfesas, ke la kunagado de Pinkerton, kiun via etato eble ne estus permesinta, ke plue la konstato de la falsita poŝtkarto estas utila por vi kaj eble ankaŭ tio, kion mi povis sciigi al vi pri Alico kaj Jameson. Sed per tio la utilo, kiun mi alportas al vi, certe estas plene elĉerpita; el la konversacio pri la krimo nur mi lernas, ĉe tre multe kaj ion treege interesan, sed ne vi!”

„Pardonu! La elparolado de miaj ideoj esence servas por precizigi tion.”

„Tion vi ankaŭ povas, farante monologojn.”

„Ho ne, tio estas io esence alia.”

La eniro de Kruse, kiu venis por demandi, ĉu por li estas io farota, interrompis la dialogon.

„Ne, la dua telegramo el Chicago ankoraŭ ne alvenis”, Moser respondis al lia demando.

„Cetere, Kruse, ĉu vi scipovas iun fremdan lingvon?”

„En la lernejo mi lernis iom la francan, sed dum mia soldateco mi forgesis ĝin. Kiam mi poste fariĝis kriminal-policano, mi denove prenis francajn lecionojn.”

„Ĉu vi opinias, ke viaj scioj sufiĉos por restado en Francujo?”

„Ĉion, kion mi bezonas, mi tre versaĵne ne sciis, sinjoro kriminal-komisaro; sed mi tamen klopodus plenumi mian taskon.”

„Mi deziras komisi vin pri observado en Nice.”

„Tion mi povos fari, sinjoro kriminal-komisaro.”

„La afero estas, konstati, kiu en la ĉefpoŝtejo de Nice demandas pri poŝte restantaj leteroj por sinjorino

Alico Smith. Mi havas kaŭzon konjekti, ke tiu sinjoro Franco Jameson, kiun ni serĉas, faros tion, eble ankaŭ nur tiamaniere, ke ĉe la ĝiĉeto por restantaj poŝtaĵoj li montras karton, sur kiu ŝtaras la nomo de sinjorino Smith. Ĉi-tiukaze la observado kompreneble estos pli malfacila.”

„Ho, tiajn aferojn mi jam faris, sinjoro kriminal-komisaro!”

„Mi scias, kaj vi procedis kontentige. Sed en fremda lando tio tamen ne estas tiel facila kiel ĉe ni. Vi agos plej bone, tuj post via alveno en Nice anoncante vin ĉe la polico kaj transdonante al ĝi leteron, kiun mi kundonos al vi. Oni tiam helpos vin. Plej bone estus, se la tica polico instigus la dejorantan poŝtoficiston, fari al vi, restanta inter la publiko en la vestiblo, signon en la momento, kiam leteroj por sinjorino Alico Smith estos demandataj. La personon, kiu faros ĉi tion, sekvu ne rimarkate kaj konstatu, al kiu la demandinto poste transdonos la leterojn. La rezulton tuj telegrafu al Berlin, sed sekvu la koncernan personon tiel longe, kiel vi povos fari tion ne rimarkate, ankaŭ se la persono forvojaĝos el Nice. Ĉi-tiukaze ĉiam telegrafe komuniku la lokon de via ĉiujfoja restado al Berlin. La aspekton de tiu sinjoro Jameson mi jam kiel eble plej bone priskribis al vi, ĉu ne?”

„Jes, sinjoro kriminal-komisaro. Kiam mi forvojaĝu?”

„Per la plej proksima vagonaro, kiun vi povas trovi en la horarlibro ĉi tie en la hotelo. Vi veturos tra Köln, Paris, Lyon, konpreneble sen haltado. Jen estas kvincent Markoj; ili sufiĉos, ĝis kiam ni ree renkontos unu la alian.”

„Certe, sinjoro kriminal-komisaro! Adiaŭ!”

„Adiaŭ, Kruse! Plenumu vian aferon bone!”

„Mi ĉiel klopodos pri tio, sinjoro kriminal-komisaro!”

Militiste salutante Kruse foriris. „Ni esperu, ke Jameson ne fariĝos suspektema!” Eĉito poste diris dubeme.

„Kruse prefere forlasos la postiron ol lasi kapti sin; mi konas lin. Li

estas kvazaŭ bonega ĉashundo. Pli altan gradon da perfekteco li neniam atingos, ĉar mankas al li la talento por kombinado.”

„Kiu ĉe vi speciale disvolviĝis!”

„Mi klopodis perfektigi ĝin, ĉar mi konsideras ĝin unu el la plej gravaj ecoj de kriminal-komisaro. Ĝi bezonas ankaŭ konstantan kontrolon.”

„Pro kio?”

„Oni neniam rajtas obstini pri unu kombinaĵo, eĉ se ĝi ŝajnas esti ne dubinda, sed oni ĉiam devas konsideri ankaŭ la eblecon, ke ĝi povas esti malĝusta.”

„Sub via instruado certe ankaŭ mi fariĝos bona kriminalistino.”

„Domaĝe, ke vi ne bezonas tion!”

„Ne miskomprenu min; nur amatore mi deziras foje okupi min pri tio. Mastrumkapabla edzino, laŭ germana kompreno, mi neniam deziras fariĝi.”

„Ĉu mi rajtas demandi, estimata fraŭlino, kiel vi prezentas al vi mastrumkapablan edzinon laŭ germana speco?”

Ŝi rigardis lin mirigite. „Nu, estas edzino, kies tuta zorgo estas dediĉita al la dommastrumado, al la purigado de la loĝejo, al la kuirado kaj bakado, al la edukado de la infanoj kaj al ĉio cetera, kio apartenas al la familia vivo.”

„Do virino tute ne havanta spirittajn interesojn, ĉu ne?”

„Por tiaj ja ne restas tempo al ŝi!”

„Ĉu en tiuj klasoj de la societo, kiuj solaj estas konsiderindaj por vi, vi jam konatiĝis kun tia virino?”

„Ne, ankoraŭ ne. Sed la germana edzino ĉiam estas priskribata tiel.”

„De kiu? De homoj, kiuj same malmulte kiel vi konas ŝin, tre estimata fraŭlino. Mia profesio ofte kondukas min al la eksterlando kaj permesas al mi ankaŭ profundajn enrigardojn en la familian vivon. Tial mi rajtas permesi al mi ankaŭ juĝon laŭ tiu direkto, juĝon, kiu sen ia particeco estiĝis sur la bazo de trankvile komparanta ekzamenado. Ĉi tiu juĝo estas tia, ke la germana edzino tiel, kiel ni devas konsideri ŝin tipo,

ĝuste pro siaj hejmaj virtoj, krom kiuj restas ankoraŭ vasta spaco por kontentigo de spirita evoluo, okupas la unuan lokon inter la edzinoj de ĉiuj kulturnacioj!"

„Antaŭe mi suspektis vin pri flataĵo — mi, pentoplene nuligas ĉi tiun suspekton; vi efektive ne estas flatemulo!“

„Kaj mi neniam deziras fariĝi tia; ankaŭ ne tiukaze, se per la malkaŝa konfeso de mia opinio mi elvokas vian malkontenton.“

„Kun sama malkaŝemo mi volas konfesi al vi, ke mi estus ĝojinta, se ankaŭ la bonaj ecoj de aliaj nacioj estus trovintaj konvenan indigon ĉe vi.“

„Ekzemple de la amerika, ĉu ne? Kiu diras al vi, ke ĉi tio ne okazas? Mi plene rekonas ankaŭ la bonajn ecojn de viaj samlandanoj, la aplombon, kun kiu ili movas sin en la societo, ilian senton pri la praktikaĵo kaj antaŭ ĉio ilian talenton por maldedanta agado. Sed ĉi tiuj bonajn ecojn de la amerikaj sinjorinoj kontraŭstaras ankaŭ malpli bona, kiu laŭ mia opinio — kiu kompreneble ne estu kompetenta por iu alia — tute nuligas la bonajn ecojn.“

„Kia ĝi estas?“

„La inerteco, kun kiu la amerikanoj tutajn kaj duonajn tagojn povas kuŝi en balancoseĝo, okupitaj pri legaĵoj kaj frandaĵoj, dum ilia edzo aŭ patro seninterrompe laboras kaj penadas, por havigi al ili ĉiun eblan komforton, ĉiun kontentigon de iliaj deziroj. Mi volonte konfesas, ke ĉefe la edzoj estas kulpaj pri tiu senlima dorlotado kaj senenergiigo, sed ne estas pravigebla, se iliaj kunulinoj preferas tian vivon, anstataŭ zorgeme agadi por la familio. Sed tio ne malhelpas, ke edzinon, kiu dediĉas sin al la lasta, mi ŝatas pli alte, eĉ se efektive ŝiaj spiritaĵoj okaze estas malutilataj per tio. Sed inteligenta edzo cetere baldaŭ rimarkus ĉi tiun malutilon kaj forigus ĝin.“

„Ke tia viro povus fariĝi feliĉa kun amerikano, vi laŭ tio konsideras ne eble, ĉu ne?“

„Tamen ne!“ Li rigardis ŝin serioze en la plene direktitajn al li

malhelajn okulojn. Poste li ridetis. „En la Biblio estas skribite: Estas pli da ĝojo pri pekulo pentanta ol pri naŭdek-naŭ ĵustulo! Se tia amerikano povus decidi, pro amo al sia edzo propriigi al si la ageman vivon de germana edzino — kio ja certe necesigus ne malmulte da energio kaj certan memdisreviĝon — ĝuste tio, kion mi nomis ŝia maldedanta talento, povus esti la plej bona garantio por la estonta feliĉo edzeca. — Sed fariĝis malfrue, fraŭlino Mac Kennon, kaj ni havas antaŭ ni longan vojaĝon. Pro tio mi ne ankoraŭ pli longe volas lacigi vin per tiaj akademias diskutoj.“

„Ĉu akademias diskutoj? Ĉu estas tiaj, kiuj ne estas valoraj por la praktika vivo?“ Akra, preskaŭ malamika rigardo el ŝiaj okuloj trafis lin.

„Tiel estas“, li rediris trankvile, same kiel ŝi levante sin de ĉe la tablo, kie ambaŭ estis sidintaj.

„Nu, bonan nokton!“ Ne donante al li la manon, kiel kutime, ŝi rapide paŝe forlasis la ĉambron.

Li postrigardis ŝin. Lian oreilon trafis la surrado de ŝiaj subjupoj, kaj ekĝemeto tremis el inter liaj lipoj. Kial li ekĝemis? — —

Daŭris sufiĉe longe, ĝis kiam Moser povis ekdormi post la lasta interparolo kun Edito Mac Kennon; kaj kiam li fine estis ekdorminta, konfuza sonĝo iluziis lian spiriton. Sidante sur ĉevalo li estis ĉasanta post Jameson, kaj kiam li, rapide rajdante sur ŝoseo, fine estis atinginta la ĉasiton kaj etendis la brakon al li, ne estis Jameson, kiun li kaptis, sed Edito, kiu ridante rigardis lin kun tiel aminda esprimo en siaj trajtoj, ke li ne sciis, ĉu kolero aŭ ĝojo pri ĉi tiu sonĝo. La marta suno jam hele brilis en lian ĉambron, kiam li malfermis la okulojn. Rapide li saltis el la lito, rapide vestis sin kaj sonorigis por ricevi la kafon.

„Alvenis ankaŭ telegramo por via moŝto,“ la ĉambroknelero serveme anoncis.

„Kie ĝi estas?“

„Ĉe la pordisto; mi tuj alportos ĝin.“

„Kaj tien ankaŭ ni nun devas veturi, por konstati la detalajn cirkonstancojn!“

„Kiel eble plej baldaŭ!“

„Mi estas vojaĝopreta.“

„Des pli bone. Nia vagonaro forveturos, kiel mi jam konstatis el la horarlibro, post du horoj. Estas rapidvagonaro al Calais. Tre volonte mi ja estus ankoraŭ atendanta je la telegramo el Wien, kiu vere jam devus esti alveninta, sed London estas pli grava. La Wien-a telegramo povus esti postsendata. Mi rapide iros al la ĉeftelegrafejo, por peti ĉi tiun pri la postsendo kaj deponi monsumon por tio. Mi revenos kiel eble plej baldaŭ.“

„Intertempe mi faros la lastajn preparojn por la vojaĝo.“

Kvina ĉapitro

„Kion vi intencas fari por ekscii, kiun Jameson venigis kun si?“ Edito demandis, kiam ili sidis en la vagonaro.

„Tio ne estos tre malfacila. Por serĉi taŭgan privatan malsanulinon, li verŝajne ne havis sufiĉe da tempo. Do ni devos turni nin al la hospitaloj, en kiuj ftizuloj estas kuracataj, kaj de ili peti informojn.“

„Ĉu ankaŭ al la privatklinikoj?“

„Mi opinias, ke tio ne estos necesa. Restado en privatklinikoj estas multekosta, sekve nur riĉaj pacientoj povas fari tion. Sed, kiel mi jam diris, Jameson bezonas malriĉan malsanulinon, ĉar nur tia konsentos pri lia deziro, montri sin sub la nomo Alico Smith. Cetere, ĉu vi skribis sciigon al Nice, ke vi bedaŭras, ne povi veni tien?“

„Jes; kaj mi aldonis, ke mi pluajn informojn pri la sanstato de Alico petos al Dresden, poŝte restante. Mi donis la poŝtkarton al Kruse, kiu promesis enpoŝtigi ĝin.“

„Tio certe okazis, ĉar Kruse estas fidinda. Espereble li trovos sinjoron Jameson en Nice.“

„Kaj kion fari, se li ne sukcesos?“

„Nu, eble ni trovos en London ion, kio remontos al ni lian postsignon.“

„Sed, kion ni entreprenos, se ankaŭ ĉi tiu espero ne realiĝos?“

Post kelkaj minutoj la kelnero revenis kun la telegramo. Moser malfermis ĝin. Ĝi venis el Berlin kaj tekstis: „Pinkerton sciigas: Leterojn por Jameson peras Ellen Burke, ĝis hodiaŭ al London, poste al Nice. Klubsekretario opinias Jameson restanta en Wien.“

Moser ree sonorigis kaj demandis la enirantan kelneron: „Ĉu fraŭlino Mac Kennon jam estas parolebla?“

„Mi tuj informos min.“

Post kvin minutoj la kelnero reaperis. „La fraŭlina moŝto ĝuste trinkas sian matencokoladon“, li anoncis.

„Diru al ŝi, ke alvenis telegramo el Chicago, ŝi bonvolu sciigi al mi, kiam mi povos paroli kun ŝi.“

Ree pasis kvin minutoj. Tiam la kelnero revenis sciigante, ke la fraŭlina moŝto post kvaronhoros estos en la legoĉambro.

Ŝi estis akurata. Kun afabla matensaluto Moser donis al ŝi la telegramon.

„Li do veturis al London kaj nun estas survoje al Nice!“ ŝi vigle kriis. „Kion li volis en London?“

„Ĉu vi memoras, ke mi hieraŭ diris al vi, ke mi estas scivolega, kiel li aranĝos la aferon en Riviero?“

„Tute bone! Ha, mi komprenas! Li timis, ke, se tie li anstataŭigus Alicon per ftizulino, la afero tro facile povus esti malkaŝata, kaj pro tio li veturis al London, por tie serĉi taŭgan personon, ĉu ne?“

„Kiel rapide via kombina talento evoluas! Tiel aŭ tute simila la afero estas. Se li instigus malsanulinon restantan en Riviero, ludi la rolon de via mortinta amikino, ĉi tio kaŭzus gravajn malfacilaĵojn. Restado en Riviero postulas ne malgrandajn monrimedojn, kaj sinjorino posedanta tiajn apenaŭ emus akcepti liajn proponojn. Por tio li bezonas malriĉan virinon, kompreneble tian, kies gepatra lingvo estas la angla. Plej bone ja amerikano estus taŭginta. Sed per vojaĝo trans la oceanon li estus perdinta tro multe da tempo, pro tio li turnis sin al London.“

„Tiukaze ni devos elekti alian vojon, kiu nun ankoraŭ ne estas destinebla, sed nur laŭ tio, kion ni intertempe ankoraŭ estos esplorintaj. Sed unu demandon bonvolu ankoraŭ respondi: Ĉu vi konas tiun virinon Ellen Burke, pri kiu en la telegramo el Chicago estas dirite, ke ŝi peras la leterojn de Jameson?“

„Ne, mi neniam aŭdis ĉi tiun nomon.“

„Supozeble estas sinjorino, kun kiu Jameson ankaŭ havas aminterrilaton. Ni ja povos konstati ĉi tion ankaŭ per Pinkerton, sed ne estas urĝe, tion ekscii. Eble via frato povus informi nin pri tio.“

„Ĉu mi telegrafu al li?“

„Letero sufiĉas; se montriĝos necese, ricevi rapidajn informojn pri sinjorino Burke, ni povos sekvigi telegramon. Sed la letero estu skribota kiel eble plej baldaŭ, ĉar pasos sufiĉe longa tempo, proksimume unu semajno, ĝis kiam ĝi atingos sian celon. Ĉu vi havus la afablecon, skribi ĝin sur la vaporsipo dum la transveturo de Calais al Dover?“

„Mi povas skribi tuj, dum la veturado aŭ dum la haltado en la stacioj.“

„Tio ne estas necesa; se ni ekspedas la leteron en Dover, ĝi alvenos ne pli malfrue.“

Sekvis longa silento. La interparolo de l' pasinta vespero laŭŝajne kaŭzis al Edito malbonhumoron, kiun ŝi ankoraŭ ne povis subigi.

Moser trege bedaŭris tion. Li ankaŭ ne povis dubi pri tio, ke la malbonhumoro direktiĝas kontraŭ li, ĉar ĝi daŭris ankaŭ dum la plua veturo. Sed kiam la kupeon eniris kelkaj sinjoroj, kiuj provis komenci konversacion kun Edito, ŝi senhezite konsentis pri la provo, kaj baldaŭ ŝi estis en vigla interparolo kun la sinjoroj. Precipe unu el ĉi tiuj, civile vestita oficiro de la husara regimento el Krefeld, konversaciis en amuza kaj sprita maniero. Moser unue silente aŭskultis. Tamen al lia akriĝita per ekzercado okulo ne restis kaŝite, ke de tempo al tempo observanta rigardo

de Edito transflugis al li, kvazaŭ ŝi volus vidi, kiel li akceptas la aferon. Sed ŝi eble ne konkludu el lia silentado, ke li koleras. Pro tio li rompisan silenton, kiam prezentigis konvena okazo, kaj li partoprenis la interparolon, disvolvante kvietan bonhumoron, al kiu la sukceso estis certa. Kiam la sinjoroj forlasis la kupeon, atinginte sian vojaĝcelon, ili certigis, ke ili nur malofte havis tiel agrablan veturon kiel hodiaŭ.

Kiam Moser kaj Edito ree estis solaj, unue la silentado denove regis.

„Kial vi hodiaŭ tute ne klopadas distri min?“ Edito subite demandis.

„Ŝajnis al mi, ke via fraŭlina moŝto unue malmulte emis al interparolo.“

„Kaj nun vi ne mas al tio, ĉu ne?“

„Mi esperas, ke vi ne konsideras min tiel malbona kavaliro!“

„Se nur pro kavaliro devo vi volas dediĉi vin al mi, nu, tiukaze mi rezignas je tio!“

„Kian rajton mi havus, fari pli ol tion?“

„Ni estas kunuloj, sinjoro Moser, almenaŭ en la afero, kiu nun okupas nin. En tia stato oni konservu ankaŭ bonan kamaradecon, ĉu ne vere?“

„Certe — sed de ambaŭ flankoj!“

„Dankon! Mi sentas min trafita. Sed preskaŭ ŝajnas al mi, kvazaŭ vi ne konsiderus ebla tian kamaradecon inter anoj de malsamaj seksoj kaj opinioj gardi vin de ĝi, ĉu ne?“

Li ridetis. „Tio ne estas ĝusta. Mi ne timas tian kamaradecon. Sed mi konfesas, ke la okazojn, en kiuj restas ĉe tiu ĉi kamaradeco sen tio, ke pli intima sento disvolviĝas ĉe unu el la du kamaradoj, mi konsideras tre maloftaj.“

„Do ni estigu unu el ĉi tiuj maloftaj okazoj, ĉu ne? Mi pensas, ke pri mi mi povas esti certa, kaj mi supozas la samon pri vi. Ĉu mi estas prava?“

„Ne tute!“

„Ho, vi surprizas min!“

„Mi estas certa pri mi laŭ tio, ke mi scias, ke mi ne parolos unu vorton, kiu povus malkaŝi intiman senton.“

(Daŭrigota)



Internacia Bulteno



Germana informilo pri la milito
kun la aldono: Literatura Revuo



Herausgeber (eldonanto): Deutscher Esperanto-Dienst (Germana Esperanto-Servo), Berlin S 59, Wißmannstr. 46 — Verlag (eldonejo): Friedrich Ellersiek, Esperanto-Verlag, Berlin S 59.

La gazeto aperas post la 15-a de ĉiu monato. Abonprezo: por 12 monatoj 4.— M., por 6 monatoj 2.— M.; unu numero 0.40 M. — Anoncoj laŭ speciala tarifo demandebla ĉe la eldonejo.

No 6 (54)

Junio 1918

4a Kolekto

Enhavo

Politiko kaj ekonomio: Klasika atestanto — La kulpo de Francujo pri la mondmilito — Bonvole Anglujo nenion redonas — Wilson pri Prusujo-Germanujo — Malbonaj profetoj — Ciémenceau la plilongiganto de l' milito — La batalo de Anglujo kontraŭ la germana industrio kaj la germanaj laboristoj — Franca militgazeto en germana lingvo.

Milito kaj militado: La militaj okazintaĵoj en la tempo de l' 18-a de Marto ĝis la 17-a de Aprilo — La rezulto de l' ne limigita U-boata milito en Aprilo 1918 — Kiel francaj soldatoj malbonkonduktas en la propra lando — „Germana barbaro“.

La mensoga milito: „Se kalumnio eĉ pasas, ĝi ĉiam ion lasas“ — La morto de Richthofen kaj la francoj — Franca falsado.

El la legantaro: „La barbaroj“ ĉe Thames — Redakcia korespondo — Bildoj. Literatura Revuo: Pro kio? (5a daŭrigo)

Plej gravaj okazintaĵoj en Majo

3. Provizora perfektigo de la packontrakto kun Rumanujo. 4. Germanaj kaj finnaj trupoj decidige venkas la malamikon en Finnlando. 10. Malsukcesinta surprizatako de anglaj marbatalfortoj kontraŭ Ostende. 21. Francaj trupoj vane provas rekonkeri por la angloj la montetaron Kemmel en Flandrujo. 24. Malsukcesinta atako de la italoj sur Zugna Torta kaj en Etsch-valo. La aŭstri-hungaraj trupoj firmtenas siajn poziciojn. 28. Komenciĝo de nova germana ofensivo sude de Laon (Francujo). 28.—31. Daŭrigo de la germana ofensivo, kiu bone progresas kaj devigas la aliancanojn al cedo de granda teritorio kun gravaj pozicioj.



La paciĝo kun Rumanujo

Post la efektiviĝita paciĝo la germana „Bukarester Tageblatt“ eldonis ekstran eldonon anoncanta la ĝojigan fakton en la rumana ĉefurbo.